

EL POPOLA ĈINIO

中國新道


1974





Lernantinoj de la Guanghi-a Instituto de Nacimallimultoj

Bela kaj riĉa Hiŝuangbanna



Novaj domoj kun nacieca karaktero de iu daj-nacieca komunumano de Ginhong-gubernio

Hiŝuangbanna situas en la sudokcidenta parto de Junnan-provinco de Ĉinio, kie loĝas multaj naciecoj. Ĝiaj fekunda grundo, pluvabundeco kaj varma klimato tre favoras al kreskado de vegetaloj.

Post la Liberiĝo, sub la brilo de la nacia politiko de la Partio, en Hiŝuangbanna efektiviĝis demokratia reformo kaj stariĝis en 1953 la Daj-nacieca Aŭtonoma Subprovinco de Hiŝuangbanna. Ĉi tie la loĝantoj de diversaj naciecoj sincere unuiĝas kaj pene laboras por konstrui Hiŝuangbannan ankoraŭ pli bela kaj riĉa. Nun la subprovinco havas pli ol 80 industriajn entreprenojn de maŝinfabrikado, elektro, kemisterko, ceramikaĵo kaj 85 malgrandajn elektrajn staciojn. 93% de la komunumoj estas atingeblaj por aŭtoj. La dragita Lancang-rivero nun estas navigebla por motorŝipoj. Ĉiu gubernio de la subprovinco havas sian sintezan hospitalon kun modernaj ekipaĵoj, ĉiu komunumo sian sanitarojn, ĉiu produkta brigado sian kuracejon kaj ĉiu produkta grupo sian sanitariston. Antaŭ la Liberiĝo tie troviĝis nur 2 elementaj lernejoj, sed nun tie estas pli ol 1,000 elementaj lernejoj kaj 8 mezlernejoj.

Komunumanoj de diversaj naciecoj de la aŭtonoma subprovinco plene utiligas la favorajn naturajn kondiĉojn por aktive disvolvi la produkton de banano, ananaso, kafo, kokoso kaj kaŭĉuko. La areo de la mondefama "Pu-er-teo" grandiĝis de miloj da hektaroj antaŭ la Liberiĝo ĝis la nunaj cent kelkdek mil hektaroj.



Daj-naciecaj komunumanoj biciklas al kampo por labori.

Laboristoj de la te-ĝardeno de Meng-haj-gubernio plukas te-foliojn.





Gumkolekto





Rikolto de banano





Veterana hani-nacieca laboristo helpas novan daj-an laboristinojn lerni teknikon.



Rizsenŝeligaj maŝinoj produktitaj de fabriko de Hiŝuangbanna

Al Niaj Legantoj

Karaj legantoj,

En la pasinta jaro ni ofte ricevis de vi kun ĝojo varmajn leterojn, kiuj portis al ni amikecon de la popoloj kaj esperantistoj de diversaj landoj kaj ni estis profunde kortuŝitaj. Kun zorgo kaj amo al nia gazeto *El Popola Ĉinio*, vi donis al ni valorajn proponojn, kritikojn kaj multajn helpojn. Je la alveno de la nova jaro, ni kore vin salutas kaj multe dankas.

En la kuranta jaro, por plibonigi nian gazeton, ni klopodas riĉigi ĝian enhavon kaj doni al ĝi pli vivecan formon kaj interesigi la rubrikojn por ke vi pli multe konu la novan Ĉinion, kaj la amikeco inter niaj popoloj kaj esperantistoj estu plifortigita.

Ĉinio estas lando kun multaj naciecoj. Ĉijare nia gazeto daŭrigas la rubrikon *Ĉinaj Naciecoj* kaj en tiu ĉi numero ni prezentas al vi grupon da artikoloj pri nacimalplimultoj de la Guanghi-a Ĝuang-nacia Aŭtonoma Regiono en sudokcidenta Ĉinio.

En la rubriko *Inter Amikoj* ni pli multe spegulos amikecan kontakton inter la popoloj de Ĉinio kaj aliaj landoj.

Foliumante tiun ĉi numeron, vi certe rimarkos la rubrikon *Esperanta Novaĵo*, kiu estas starigita laŭ proponoj de multaj legantoj.

Nemalmultaj legantoj esperas akiri fundamentan scion pri ĉinaj historio, geografio k. a. Tial ni aldonis la novan rubrikon *Ĉina Geografio*, kiu aperos alterne kun la rubriko *Historiaj Rakontoj*. Ekde n-ro 2, 1974, en la rubriko *Respondoj al Legantoj* ni respondos iujn demandojn de legantoj.

Sur la interna paĝo de la dorskovrilo ni publikigos kolorajn fotojn de ĉinaj metiartaĵoj laŭ viaj proponoj.

Karaj legantoj, ni kore esperas, ke vi zorgos kaj subtenos EPĈ, kaj skribos al ni de tempo al tempo viajn valorajn opiniojn kaj postulojn kiel antaŭe.

La Redakcio

Sub la Prilumado de la Nacia Politiko de la Partio

—Kunsido de diversnaciecaj popolanoj de Bajse-subregiono pri nacieca regiona aŭtonomeco

La nacieca problemo de Ĉinio tre interesas niajn legantojn. Multaj el ili skribis al ni kun jenaj demandoj: Kian pozicion en politiko okupas la ĉinaj nacimalplimulto? Kiel statas iliaj socio kaj ekonomio? Kiamaniere la ŝtato helpas ilin en disvolvado de ekonomio, kulturo, eduko kaj higiena afero? Ĉu iliaj lingvoj, moroj kaj kutimoj estas respektataj? ktp. Por kontentigi la postulojn de la legantoj, niaj ĵurnalistoj speciale iris al Bajse-subregiono de la Guangxi-a Ĝuang-nacia Aŭtonoma Regiono sude de Ĉinio — la loko loĝata de multaj naciecoj, kaj petis ke la komitato de KPCĈ de Bajse-subregiono invitu laboriston, kamparanon, instruiston, kuraciston kaj kadrojn de la lokaj diversnaciecoj al kunsido pri la problemo de nacieca regiona aŭtonomeco.

La kunsidon prezidis kamarado Vej Jongfu, vicsekretario de la nomita komitato.

— La Red.



Vej Jongfu



Hoŭ Gijun



Jang Zongde



Guo Bulai



Huang Gintang

Ĉeestantoj:

Vej Jongfu (ĝuango), vicsekretario de la komitato de KPCĉ de Bajse-subregiono

Hoŭ Gijun (hano), estro de la Plana Komitato de la Revolucia Komitato de Bajse-subregiono

Jang Zongde (mjaŭo), vicedestro de la Revolucia Komitato de la Longlin-a Diversnacieca Aŭtonoma Gubernio

Guo Bulaŭ (golaŭo), membro de De-ekonomumo

Huang Gintang (ĝuango), membro de la Konstanta Komitato de la Revolucia Komitato de Bajse-subregiono kaj vicedestro de ĝia Eduka Buroo

Vang Hjuefang (jio), mezlerneja instruistino

Vej Ĵenhan (ĝuango), kirurgo

Luo Gujjue (jaŭo), estrino de la Virina Federacio de Lingjun-gubernio

Ĉen Hujŝu (ĝuango), laboristino de la Trika Ĝuang-brokata Fabriko de Ginghi-gubernio


Vej Jongfu:

En nia loko loĝas popolanoj de diversaj naciecoj. Kiel ili statas? Nun ni kunsidu kaj libere parolu, kamaradoj.

Antaŭ ĉio mi prezentas la ĝeneralan staton de nia Bajse-subregiono, kiu situas en okcidenta Guanghi. Ĝi konsistas el 12 gubernioj kaj havas pli ol 2,500,000 loĝantojn el la naciecoj ĝuang-a, jaŭ-a, ji-a, mjaŭ-a, golaŭ-a kaj han-a. 80 procentoj el ili estas ĝuangoj. En la jaro 1929, ĉi tie stariĝis revolucia bazo gvidata de la Komunista Partio de Ĉinio, demokratia reĝimo de laboristoj kaj kamparanoj kaj la Sepa Armeo de la Ĉina Laborista-Kamparana Ruĝa Armeo. Post foriro de la ruĝa armeo al la centra soveta regiono kaj al la nordo de Ĉinio por batali kontraŭ la japanaj agresantoj, la popolanoj de la revolucia bazo suferis de freneza tretado de kuomintangaj reakciuloj. Sed ili ne estis timigitaj de la malamikoj, kaj daŭre persistis en gerila milito ĝis la liberiĝo de ilia loko. Post la Liberiĝo, laŭ la politiko de la Komunista Partio de Ĉinio pri nacia regiona aŭtonomeco, en nia loko stariĝis diversnacieca aŭtonoma registaro. Sub la unueca gvido de la ŝtato kaj laŭ sia nacieca karaktero, la loka registaro administras siajn aferojn. La Guanghi-a Ĝuang-nacia Aŭtonoma Regiono stariĝis en marto de 1958, kaj nia Longlin-a Diversnacieca Aŭtonoma Gubernio de Bajse-subregiono en januaro de 1953. Dum la lastaj pli ol 20 jaroj, giganta ŝanĝiĝo okazis en nia loko, kio ŝuldas al la intima unuiĝo inter la diversaj naciecoj kaj ilia firma praktikado de la



Vang Hjuefang



Vej Ĵenhan



Luo Gujjue



Ĉen Hujŝu

revolucia linio kaj nacia politiko de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ.

MALNOVA BAJSE — INFERO DE LA DIVERSAJ NACIECOJ

Hoŭ Gijun:

Antaŭ la Liberiĝo, sub la malluma regado de reakcia klaso en Bajse-subregiono, la socio kaj ekonomio de ĝŭangoj, mjaŭoj, jaŭoj k.a. ĝenerale troviĝis en la postĝinta periodo de feŭda bienula ekonomio, kaj la nacimalplimulto en la vasta montregiono faris kulturadon eĉ per primitivaj metodoj. Tiam, la malriĉaj kamparanoj de nacimalplimulto suferis kaj de subpremo kaj diskriminacio de han-ŝovinismo de la kuomintanga reakciularo kaj de ekspluatado kaj prirabado de la bienuloj kaj ĉefoj de sia nacieco, tial ili vivis en malluma abismo, kaj pli mizere en la tagoj de katastrofoj. Ni prenu Pingpo-vilaĝon kie loĝas ĝŭangoj kiel ekzemplon. En la jaro 1943, tie okazis trosekeco. Pli ol 200 el la 279 familioj de la tuta vilaĝo, escepte de la malmultaj bienulaj, forfuĝis aliloken, multaj mortis de malsato kaj nemalmultaj vendis siajn gefilojn.

Vang Hjuiefang:

Antaŭe, la reakcia reganta klaso rigardis la nacimalplimultojn ne kiel homojn. Ili nomis la jiojn bestoj kaj mjaŭojn mjaŭhundoj. La reakciaj regantoj povis laŭplaĉe prirabi la nacimalplimultojn, seksatenci virinojn, eĉ mortigi homojn kaj fari ĉiajn abomenindaĵojn.

Luo Gujjue:

La kruela ekspluatado devigis nin jaŭojn migradi. Kie estis alta monto kaj densa arbaro, tien ni transloĝiĝis. Sur altaj montoj ni kulturebligis virgan teron kaj vivis en primitiveco kaj migrado. Tial oni nomis nin “migrantaj montanoj”.

Guo Bulaŭ:

Ni golaŭoj vivis en montregiono. Same kiel aliaj nacimalplimulto, ni suferis ne nur de ekspluatado kaj subpremado sed ankaŭ de tiroida hipertrofiado pro manko de salo.

Ĉen Hujŝu:

Ni laborantaj popolanoj de nacimalplimulto estis generacion post generacio senigitaj je la rajto viziti lernejon. En multaj vilaĝoj troviĝis neniu klerulo kaj ni vivis tiam ankoraŭ en la periodo noti aferojn per ŝnurnodo kaj lignogravuro.

Vej Jenhan:

Antaŭ la Liberiĝo, en la tuta regiono troviĝis nur du hospitaloj kun 67 kuracistoj, kaj ilia plej granda operacio estis apendicektomio. Pro longtempa manko de kuracado kaj medikamentoj, epidemioj ĉie cirkulis, multaj homoj mortis ĉiujare de ĥolero, variolo, malario kaj skistosomozo.

MASTROJ DE SIA PATROLANDO

Vej Jongfu:

Post la fondiĝo de la nova Ĉinio, niaj nacimalplimulto fariĝis mastroj de sia patrolando kaj ĝuas la rajton egalecan en la vivo. Por protekti la egalecon en politiko kaj aŭtonomecon de la diversaj naciecoj kaj mobilizi ilian aktivecon en pli bona disvolvo de iliaj ekonomia kaj kultura aferoj, la Partio ellaboris la politikon de nacia regiona aŭtonomeco. Tio estas unu el fundamentaj politikoj elmetitaj de la Centra Komitato de la Partio kaj Prezidanto Maŭ por solvi la enlandan nacian problemon, laŭ la fundamenta principo de Marksismo-Leninismo pri nacia problemoj kaj kunligante la historiajn kaj nunajn realajn kondiĉojn de Ĉinio.

Hoŭ Gijun:

Laŭ la difino de la Konstitucio de la Ĉina Popola Respubliko, la lokoj kie efektiviĝis nacia regiona aŭtonomeco ĉiuj estas partoj nedisigeblaj de la teritorio de la Ĉina Popola Respubliko, kaj la aŭtonoma organo de ĉiu nacieca aŭtonoma regiono estas kaj loka registaro kaj aŭtonoma registaro de nacieca aŭtonoma regiono. Tiuj organoj plenumas sian funkcion de loka registaro sub la unueca gvidado de la Centra Popola Registaro kaj samtempe ĝuas aŭtonomecon difinitan de la Konstitucio. Ĝi administras la lokan financon en la rajtokadro difinita de la leĝo kaj ellaboras aŭtonoman regularon kaj apartan regularon laŭ la karakterizaĵoj de politiko, ekonomio kaj kulturo de la lokaj naciecoj. Ĝi uzas unu aŭ kelkajn lingvojn ĝenerale uzatajn en la loko. Ĉio ĉi tio fundamente ŝanĝis la staton ke la nacimalplimulto havis nenium rajton administri sian vivon en la malnova Ĉinio.

Jang Zongde:

Post sia fondiĝo, nia Longlin-a Diversnacieca Aŭtonoma Gubernio ellaboris sian aŭtonoman regularon en la difinita kadro

de la dekretoj de la Centra Popola Registaro kaj la superaj popolaj registaroj, kaj laŭ la konkretaj kondiĉoj de nia gubernio. Laŭ la difino de la aŭtonoma regularo la financa sistemo de nia gubernio estas malsama ol tiu de la ordinaraj gubernioj. Aparte zorgante la aŭtonoman gubernion, la ŝtato ĉiujare donas al ni pli da prepara sumo ol tiun al la ordinara, kaj la helpa sumo por nacimalplimulto okupas relative grandan proporcion en la totala elspezo de la aŭtonoma gubernio.

Huang Gintang:

Nun la diversnaciecaj laborantaj popolanoj de nia Bajse-subregiono tenas diversnivelajn regpotencojn, ĝuas la veran egalecon en politiko kaj fariĝis mastroj de sia patrolando. La ĝuangoj kaj aliaj nacimalplimulto de nia loko elektis siajn reprezentantojn por la pasintaj tutlandaj aŭ regionaj popolaj kongresoj. La nombro de reprezentantoj por la popola kongreso de la aŭtonoma regiono produktiĝas laŭ la proporcio de la tuta loĝantaro de la respektivaj nacimalplimulto. Apartan favoron en tio oni donas al frataj naciecoj kun pli malmulta loĝantaro.

Natang-brigado de Tanĝou-komunumo en kampa plugado





*Laboristoj de Dongsun-karbo-
minejo de Bajse fosas karbon.*

Guo Bulaŭ:

Vere tiel estas. En nia gubernio golaŭ-nacieco havis nur 400 membrojn en la jaro 1958, kiuj ankoraŭ ne atingis la loĝantaron nombron por elekti unu apartan reprezentanton al la popola kongreso de la aŭtonoma regiono, sed ni rajtigite elektis nian reprezentanton por la kongreso.

Jang Zongde:

Pri tio ankaŭ mi havas profundan komprenon. Dum la pli ol 20 jaroj post la fondiĝo de nia Longlin-a Diversnacieca Aŭtonoma Gubernio, ni elektis 34 reprezentantojn el la nacimalplimultoj por la pasintaj popolaj kongresoj de la tuta lando kaj la Guanghi-a Ĝŭang-nacia Aŭtonoma Regiono. Ankaŭ mi partoprenis en la Tria Tutlanda Popola Kongreso.

Veĵ Jongfu:

Por ĝuste praktiki la nacian politikon de la Centra Komitato de la Partio kaj Prezidanto Maŭ, la diversnivelaj gvidantaroj de la Partio kaj la registaro de Bajse-subregiono kulturis kaj promociis grandan nom-

bron da nacimalplimultaj kadroj, aplikante serion da efikaj rimedoj. Tiuj kadroj diligente servas al la popolo, intime kontaktas kun la amasoj, tial ili ricevis subtenon de la lastaj. Nun la nacimalplimultaj kadroj de la tuta Bajse-subregiono jam pliiĝis de 2,600 en 1950 ĝis pli ol 13,600. La kadroj el nacimalplimultoj okupas 65 procentojn de la guberniaj ĉefaj gvidantaj kadroj, kaj 86 procentojn de la komunumaj. Niaj diversnivelaj partiaj organizoj ankoraŭ donas apartan atenton al kulturado kaj akceptado de la avangardaj elementoj de la nacimalplimultaj laborantaj popolanoj. Nun en la tuta subregiono la partianoj de nacimalplimultoj okupis pli ol 70 procentojn el la tuta partia membraro, kaj ludas avangardan rolon en la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado.

Guo Bulaŭ:

Nia golaŭ-nacieco nun havas 662 membrojn, kaj 21 el ili fariĝis ŝtataj kadroj, kuracistoj kaj instruistoj. Nur en nia loko Hiaĉong, el la 12 familioj 6 personoj iris al Pekino kaj vidis la grandan gvidanton Prezidanto Maŭ, kaj 8 fariĝis membroj de

la Komunista Partio de Ĉinio. Guo Hiu-
ming antaŭe estis ordinara laboranta virino
de nia golaŭ-nacieco, sed nun laboras kiel
estro de la Virina Federacio de Longlin-
gubernio.

Huang Gintang:


La praktikado de la politiko de nacia
regiona aŭtonomeco garantias egalecon en
politiko al la diversaj nacimalplimulto-
j, plene mobilizas ilin aktive partopreni en
la ŝtata politika vivo kaj konstruado de
socialismo, plirapidigas disvolvadon de la
diversaj aferoj de nia subregiono, pluapaŝe
plifortigas la nacian unuiĝon, la unuecon
de la patrolando kaj la diktaturon de la
proletaro, kaj dank' al tio la fizionomio de
nia loko noviĝas tagon post tago.


EKONOMIA KONSTRUADO EN PROSPERO

Vej Jongfu:

Post la Liberiĝo, la ekonomio de nia
Bajse-subregiono akiris rapidan disvolvi-
ĝon. La Partio kaj la ŝtato donis apartan
favoron al ni en investo por fundamenta
konstruado kaj liverado de ekipaĵoj, tiel
ke ni povas disvolvi nian agrikulturon,
industrion kaj trafikan komunikadon kun
relative granda rapideco. En la pasinteco,
ofte okazis inundo kaj trosekeco pro man-
ko de akvoutiligaj konstruaĵoj. Post la
Liberiĝo, sub la subteno de la ŝtato, la
diversnaciecaj popolanoj, sin apogante sur
la propraj fortoj, peneme luktante kontraŭ
malfaciloj kaj unuiĝante kaj interhelpante

Ĝuang-aj kaj han-a laboristinoj de la Tianjang-a Silkteksejo studas teknikon de faden-interligo.





Elektra pumpstacio de iu komunumo

energie faris agrikulturan akvoutiligan konstruadon. Dank' al 1,287 akvorezervujoj kaj 599 mezaj kaj malgrandaj elektrejoj konstruitaj, la areo de rizkampoj rikolteblaj ĉu en trosekeco aŭ en inundo ĝis la jaro 1972 pligrandiĝis okoble kompare kun tiu de 1950. La grena produktokvanto de la tuta subregiono plimultiĝis jaron post jaro, kaj nun jam superis nian bezonon, kaj ankaŭ la greno liverata al la ŝtato senĉese plimultiĝis dum la lastaj dek jaroj.

Hoŭ Gijun:

Antaŭe ĉi tie troviĝis nur kelkaj rizmuelejoj, tabako-prilaborejo k.a. per manipulado kun 177 laboristoj kaj oficistoj. Preskaŭ neniuj gubernio havis industrian. Post la Liberiĝo, la ŝtato multe investis al la industria konstruado de Bajse-subregiono. Nun en nia loko jam konstruiĝis 520 mezaj kaj malgrandaj for-

stokulturejoj, karbominejoj kaj fabrikoj de metalurgio, maŝino, elektro, kemio, konstruaj materialoj, manĝaĵoj, tekstilado kaj paperfarado.

Huang Gintang:

La ŝtato ankaŭ donis al ni kompletojn da industriaj ekipaĵoj, kio multe akcelis la disvolviĝon de nia industrio. Ekzemple, la modernaj ekipaĵoj de la Tianjang-a Silkteksejo estas liveritaj de la ŝtato.

Vang Hjuelang:

Nun oni jam povas aĉeti en la komunumaj butikoj ĉiutagajn bezonaĵojn kaj kemian sterkon, insekticidon, malgrandajn agrikulturajn maŝinojn kaj altajn produktajn materialojn fabrikitajn de nia subregiono.

Hoŭ Gijun:

Por ŝanĝi la postĝintecon de la komunikado en nia loko, per ŝtata investo oni konstruis multajn montajn ŝoseojn. Nun 110 el la 116 komunumoj de la tuta subregiono kaj multaj vilaĝoj estas atingeblaj per aŭto. La longeco de la ŝoseoj kreskis de 303 kilometroj antaŭ la Liberiĝo ĝis nunaj 4,150.

Jang Zongde:

Helpate de la ŝtato, la diversnaciecaj popolanoj de nia Longlin-gubernio konstruis sinsekve 18 montregionajn ŝoseojn, tiel ke ĉiuj komunumoj kaj duono da brigadoj estas atingeblaj per aŭto. En la pasinteco oni bezonis 8 tagojn per piediro por atingi Bajse de sia gubernia urbo, sed nun nur 8 horojn per aŭto.

Luo Gujue:

Antaŭe, en multaj lokoj mankis akvo al homoj kaj brutoj. Post la Liberiĝo, la ŝtato elspezis specialan sumon por konstrui por ni putojn kaj lagetojn. Antaŭe

mankis akvo al Giahiaŭ-a Jaŭ-nacieca Produkta Grupo en ses monatoj ĉiujare, tiel ke oni devis vektporti akvon de malproksima loko per dek procentoj de la labortagoj de la grupo en ĉiu jaro. Poste, helpate de la ŝtato, la grupo fosis 12 putojn, tiel ke la problemo de akvo-konsumo por homoj kaj brutoj estis solvita.

Guo Bulaŭ:

Post la Liberiĝo, la ŝtato senpage donis grandan kvanton da agrikulturaj instrumentoj, insekticidoj, semoj, kemiaj sterkoj al niaj komunumoj kaj brigadoj en ekonomiaj malfaciloj, pruntedonis al ili kun malalta interezo aŭ sen interezo. Dank' al tio la produkto de nia produkta grupo multe disvolviĝis. Nun la kolektivo havas re-

zervon de greno kaj ĉiu familio superbezonan grenon. Jam forpasis por eterne la amaraj tagoj de la pasinteco.

Veĵ Jongfu:

La ŝtato aplikis ankaŭ serion da rimedoj por aktive disvolvi nacian komercadon. Nun en nia subregiono jam stariĝis multaj ŝtataj magazenoj, komercaj kooperativoj kaj iliaj filioj eĉ en malproksimaj lokoj, kiuj formis nacian komercan reton.

Guo Bulaŭ:

Nun ni povas aĉeti ĉeloke produktajn rimedojn kaj vivbezonaĵojn kaj vendi niajn produktaĵojn je racia prezo.

Laboristoj de la Ĝenerala Stacio de Peraŭta Transportado de Bajse-subregiono ekzamenas aŭtojn antaŭ ekveturo.





*Kampana Postlabora Lernejo
de Longping-brigado*

Luo Gujue:

La ŝtato vendas al ni nacimalplimultoĵojn vivbezonaĵojn kun sama prezo tiel en foraj lokoj kiel en urbo. Ekzemple, kilogramo da salo kostas en la regiona ĉefurbo Nanning je 0.34 juano, kaj je la sama prezo ankaŭ en Lingjun-gubernio je pli ol 300 kilometroj fore de Nanning. Kaj la ŝtato aĉetas agrikulturajn kaj flankokupajn produktaĵojn je sama prezo ĉie en la regiono por protekti la aktivecon de la diversnaciecaj popolanoj en produktado.

Hoŭ Gijun:

En la lastaj pli ol 20 jaroj, la ŝtato ankaŭ sendis al nia loko grandan nombron da kadroj, teknikistoj, laboristoj kaj diplomitaj studentoj por helpi nin en konstruado kaj disvolvado de lokaj industrioj kaj disvastigo de progresinta tekniko de agrikultura produkto.

Vej Jongfu:

Dum la konstruado de la Tianjang-a Silkteksejo, al tiu ĉi fabriko la ŝtato sendis 130 ŝanhajajn teknikajn laboristojn kaj kadrojn por helpi la lokajn laboristojn ĝuangajn, mjaŭajn, jaŭajn kaj jiajn en mastrumado de la moderna tekniko. En agrikulturo, la hanaj veteranaj kamparanoj de la provincoj Guangdong, Gilin, Ĝegiang kaj Henan venis al nia loko por instrui al ni progresintan teknikon pri plantado de rizo, kolzo, tritiko kaj kotono.

Huang Gintang:

Ankaŭ ni aktive kulturis teknikistojn de la nacimalplimultoĵoj, kaj sendis parton de la gejunuloj al aliaj lokoj kaj altaj lernejoj por lerni. Kaj dank' al la specialaj lernejoj kaj teknikaj kursoj funkciigitaj de ni mem nun ni jam havas diversnaciecajn teknikistojn.

KULTURA, EDUKA KAJ HIGIENA AFEROJ EN DISVOLVIĜO

Hoŭ Gijun:

La Partio kaj la registaro ĉiam donas grandan atenton al disvolvado de niaj eduka kaj higiena aferoj. La subregiono, gubernioj kaj komunumoj havas siajn instituciojn kaj kadrojn por administri edukan kaj higienan aferojn. La ŝtato asignis al la nacimalplimultaj eduka kaj higiena aferoj pli grandan sumon, ol la difinitan de la unueca normo, por ke iliaj fundamenta konstruado de lernejoj kaj hospitaloj, instruaj kaj kuracaj ekipaĵoj ricevu relative rapidan disvolviĝon. La sumoj por tiu celo senĉese kreskas ĉiujare. Ni prenu la sumon

por fundamenta konstruo de edukado asignitan de la ŝtato al nia subregiono kiel ekzemplon. La sumo de 1973 estis 22-oblo de tiu de 1952.

Huang Gintang:

Pro maldensa loĝado de la nacimalplimultaj popolanoj, la Partio kaj la ŝtato aparte atentis pri racia dispozicio de lernejoj. Nun ĉiu gubernio havas kompletan mezlernejon, ĉiu komunumo elementan mezlernejon kaj ĉiu brigado elementan lernejon.

Vang Hjuiefang:

Por ke pli multaj infanoj vizitu lernejon, la ŝtato difinis ke en nia subregiono oni povas funkciigi kurson kun ĉirkaŭ dek in-

Kuracistinoj iras profunde en montvilaĝojn por servi al la diversnaciecaj komunumanoj.



fanoj, sed aliloke oni devas kun 25 lernantoj.

Vej Jongfu:

Multe kulturi nacimalplimultajn instruistojn kaj kuracistojn estas unu el la gravaj enhavoj de la nacia politiko de nia Partio. Post la Liberiĝo, krom multaj han-naciecaj instruistoj kaj kuracistoj senditaj al nia loko, ni mem starigis naciajn instruistajn kaj medicinajn lernejojn kaj samtempe sendis intelektajn gejunulojn de nacimalplimultoj al naciaj, instruistaj kaj medicinaj institutoj de Pekino, Nanning kaj aliaj urboj.

Jang Zongde:

La elspezo de la lernantoj de naciaj aŭ instruistaj lernejoj en vivado kaj lernado tute estas pagata de la ŝtato, kaj la lernantoj de aliaj lernejoj ĝuas stipendion. Krome, la ŝtato donas al ili ankaŭ monon por vestoj kaj vizitado. La lernejoj sendis apartajn instruistojn por direkti la nacimalplimultajn studentojn. Tiuj rimedoj ludas grandan rolon en ilia lernado.

Vang Hjuefang:

Dum la studado en la Pekina Centra Instituto por Naciecoj mi ofte ricevis varman zorgon kaj direktadon de gvidantoj kaj instruistoj de la instituto. Ĉiam kiam mi rememoris pri tiu sceno, mi havis emocian senton. Mi devas ne vanigi la esperon de la Partio kaj kontribui mian tutan vivon al la popola eduka afero.

Huang Gintang:

En la pasintaj jaroj, la ŝtato kulturis sume 12,761 nacimalplimultajn instruistojn, kiuj konsistigas 58 procentojn de la tuta instruistaro de la subregiono. Kaj krome troviĝas 3,910 nacimalplimultaj kuracistoj kaj pli ol 12,800 iliaj kamparaj kuracistoj, sanitaristoj kaj akuŝistinoj. Ili ludas aktivan rolon en ĝeneraligo de eduko kaj kuracado, kaj protektado de popola sano.

Vej Ĵenhan:

Nia Bajse-a Subregiona Hospitalo estis provinca hospitalo antaŭ la Liberiĝo, havis

tre simplajn ekipaĵojn kaj pli ol 30 laborantojn, de kiuj nur duono estis kuracistoj. Nun ĝi jam fariĝis relative granda moderna hospitalo kun areo je 13.5-oblo pli granda ol tiu de la antaŭa, havas ultrasonan diagnozilon, kuracilon kun ultrakurtaj ondoj kaj elektran analizan pesilon kun eraro de dek-mil-ono, kaj kapablas fari operacion de koro kaj kranio, ablacian operacion de pulmofolio, hepato, stomako k.a.

Vej Jongfu:

Por protekti sanon de la diversnaciecaj popolanoj, la Partio kaj la ŝtato sendis multajn kuracajn taĉmentojn de Pekino, Tiangin kaj Nanning por servi al la amasoj, tio ricevis bonvenigon de la lastaj. En distribuo de kuracistoj kaj livero de medikamentoj kaj kuracaj ekipaĵoj, la ŝtato donis apartan zorgon al nia limregiono. Nun, en nia subregiono jam stariĝis 129 hospitaloj, ĉiu gubernio kaj komunumo havas sian hospitalon, produkta brigado sian kuracejon kaj produkta grupo sian kamparan kuraciston.

Dank' al la relative bonaj higiena kaj kuraca kondiĉoj ĝuataj de la diversnaciecaj popolanoj, multaj epidemiaj malsanoj jam estis eliminataj aŭ briditaj, tiel ke la malpliigo de la loĝantaro de nacimalplimultoj estis turnita. Laŭ la statistiko de 1972, la nombro de la ji-oj kaj golaŭ-oj plej malmultaj de la Longlin-a Diversnacieca Aŭtonoma Gubernio kreskis respektive je 70 kaj 120 procentoj kompare kun tiu en la komenca periodo post la Liberiĝo.

Jang Zongde:

La Partio kaj la registaro rigardas respektan al la lingvoj, moroj kaj kutimoj de la nacimalplimultoj kaj disvolvon de ilia kulturo kiel gravan parton en praktikado de la nacia politiko. Ni estas respektataj, kiam ni parolas en la mjaŭ-a lingvo kaj vestas en mjaŭ-aj vestoj. La han-naciecaj kadroj laborantaj en nia loko diligente lernas la lingvon de nacimalplimultoj, respondante la

alvokon de la Partio. Krom la programe-
roj en la ĝuang-a lingvo de la stacio de la
aŭtonoma regiono, la disaŭdigaj stacioj de
komunumoj kaj gubernioj ankaŭ parolas per
la lingvoj de la lokaj nacimalplimulto-
j. Niaj mjaŭ-aj junulinoj lertas en brokado kaj
ŝatas mem fari sian nacian veston. Por
respekti ilian moron fari veston per lino-
fadenoj, la ŝtato difinis ke ĉiu familio povas
ricevi pecon da tero por planti linon.

Luo Gujjue:

Por kontentigi la bezonon de nacimal-
plimulto en vestfarado, ornamado kaj la
vivo, la ŝtato starigis specialajn fabrikojn
por produkti diversajn naciecajn komerca-
ĵojn, kiaj estas ĉaspafiloj, pulvo, tukoj por
porti infanojn, flutoj ŝatataj de golaŭoj,
kaptukoj kaj nigra ŝtofo ŝatataj de ni jaŭoj.

Ĉen Hujŝu:

Nia fabriko speciale produktas ĝuang-
an brokaton. Ĝi estas tradicia metiartaĵo

kun nacia stilo teksita per diverskoloraj
silkaĵoj kaj kotonaj fadenoj, kaj ŝatata de
ĝuangoj. Por kontentigi tiun bezonon, ni
produktas grandan kvanton da tia brokato
kaj senĉese pliigas ĝiajn specojn kun pli
alta kvalito.

Vej Jongfu:

Por heredi kaj disvolvi eminentan nacian
kulturon, ni ankoraŭ sendis speciale kadrojn
por vaste kolekti kaj ordigi kantojn, dancojn,
proverbojn kaj popolajn rakontojn de la
diversaj nacimalplimulto, kaj kuraĝigas li-
teraturajn kaj artajn laborantojn iri inter
la popolanojn de nacimalplimulto, por ke
ili unuflanke lernu de laboristoj kaj kampara-
noj, kaj aliflanke kreu plimultajn verkojn
kun socialisma enhavo kaj nacia formo, por
ke la nacia literaturo kaj arto floru pompe.

Ni konvinkiĝas, ke sub la prilumado de
la nacia politiko de la Partio nia subregiono
konstruiĝos pli prospera.

*Huang Zuokin (ĝu-
ango), membro de
la Partia Komitato
de la Guanghi-a
Ĝuang-nacia Aŭto-
noma Regiono de
KPCĈ kaj vicsekre-
tario de la Partia
Komitato de Zuo-
deng - komunumo
studas dokumentojn
de la Deka Tut-
landa Kongreso
kune kun komun-
umanoj.*





Gvidantaj kadroj de la partia komitato de Hilin-gubernio kaj termezuristoj faras mezuradon al Tuoniang-rivero por akvoutiliga konstruado.

Novajoj ĉe

Tuoniang-rivero

de ŜI LIN

PROFUNDA aŭtuno. Ni veturis per aŭto okcidenten ekde Bajse-gubernio de Guanghi al Hilin-gubernio, la plej alta loko en Guanghi. La aŭto kuris sur la serpenta kurboza ŝoseo. Ekster la aŭto estas ondiĝanta montaro kaj nigre verda arbaro. Post unu kaj duona tagoj da veturado ni atingis la celokon.

Bada-urbeto situas tuj apud la rivero Tuoniang. Tie funkcias la oficejo de Bada-komunumo. La komunumo havas pli ol 14,000 membrojn el kvin naciecoj, nome ĝuango, hano, mjaŭo, jaŭo kaj jio. Ni atingis tiun lokon en foirtago. Gekomunumanoj en diversnaciecaj kostumoj venis al la foiro de diversaj lokoj rajdante, veturigante bovcaron aŭ biciklante. Ili ĝoje portis al la foiro diversajn produktaĵojn por vendi al

la ŝtato kaj aĉetis por si industriajn vivbezonaĵojn.

Sed kiel vivis la nacimalplimulto en la malnova socio? Antaŭe pro la kruela ekspluatado de bienuloj kaj montotiranoj la nacimalplimulto povis loĝi nur sur altaj montoj kaj vivtenis sin per ĉasaĵoj kaj sovaĝaj fruktoj. La agrikulturo estis tre primitiva. Sur la altaj montoj mankis akvo kaj ilia vivo ofte estis minacata de sekegeco. En pluvo ĉiuj familioj metis eksterdome diversajn ujojn por kolekti pluvakvon. En pluvmanka sezono, ĉiutage la unua grava afero por ili estis porti akvon. Por akiri akvon oni devis iri plurajn kilometrojn aŭ eĉ pli ol 20 km. tra montaj vojetoj. Ankaŭ dekeljaraj knaboj devis iri porti akvon per kalabaso kune kun plenkreskuloj. En

multaj lokoj oni devis rampi en kavernojn por kolekti akvon kunportante bambusite-
lojn kaj torĉojn. En serioza sekegeco la
plej peniga laboro por montanoj estis akiro
de akvo. Oni devis porti akvon de dekoj
da kilometroj por prepari manĝaĵojn.
Ofte okazis, ke atendata akvo elverŝiĝis
pro hazarda mispaŝo kaj falo de la portanto,
tiel ke oni neniel povis fari la kuiradon ĝis
realporto de akvo! Kiel valora estis akvo
por la tieaj homoj!

Tiam bienuloj kaj montotiranoj mono-
poligis ĉiujn akvoprovizejojn por ekspluati
la loĝantojn. En Putuo-vilaĝo estis nur
unu puto, kiu estis monopoligita de ĝuang-
nacieca bienulo. Lia lakeo gardis apud la
puto, kaj kiu volis ĉerpi akvon el ĝi, tiu devis
pagi al li kelkajn monerojn. Foje malsani-
ĝinta servistino Jong Jakjuan ĉerpadis akvon
por la bienulo kaj sentis soifon. Ŝi trinkis
kuleregon da putakvo. Sed tion rimarkis
la lakeo. Li batis ŝin ĝis sveno kaj ĵetis

ŝin en montaron. Tio ege indignigis la
vilaĝanojn kaj ili ŝtele savis kaj reportis ŝin.

Tie cirkulas inter la popolanoj jena legen-
do: Antaŭ multaj multaj jaroj vivis mjaŭ-
nacieca junulo Jang Jaĝi. Li volis solvi
por malriĉuloj la problemon de akvo kaj
serĉadis fonton malgraŭ malfacilo kaj laci-
ĝo. Portante sian maljunan patrinon sur
la dorso li transiris monton post monto.
Iun tagon ili venis al profunda kaverno kaj
trovis en ĝi akvon. Sed la patrino jam
mortis pro soifo. Li petegis la fonton kun
larmoj: “Ho fonto en la kaverno, kiam vi
bonvolos mem flui sur la montojn?” Je la
diro tute malheliĝis la mondo kaj ekpluvegis
torente. La akvo en la kaverno pli kaj pli
ŝveliĝis kaj fine fluis el la kaverno. La
torente flugis malsupren laŭ la monto kaj
formis riveron. Sed la junulo estis englutita
de la torente. Por memori la aferon oni
nomis la riveron “Tuoniang” (en la ĉina
lingvo ‘tuo niang’ signifas ‘dorse porti pa-



*Tu Huang-elektr-
ejo en konstruado*

trinion'). Sed antaŭ la Liberiĝo ankaŭ tiu rivero estis monopoligita de bienuloj kaj tiranoj. Kvankam la rivero fluas preter la monto, tamen ĝi neniam portis bonon al la malriĉaj loĝantoj sur la altaj montoj. La amasoj daŭre estis ekspluatataj kaj prirabataj de bienuloj kaj montotiranoj. Oni triste veadis:

*Tagnokte fluas Tuoniang-rivero,
daŭradas same nia mizero.
Ja kiam tiu ĉi hom-manĝa moro
venos al sia lasta horo?!*

“La Liberiĝo metis finon al la hommanĝa mondo. Tuoniang-rivero fariĝis posedaĵo de la popolo kaj komencis servi al ĝi.” Mjaŭ-nacieca kadro Li Guohiang, vicestro de la revolucia komitato de la komunumo, prezentis al ni la ŝanĝiĝon de la komunumo. En la lastaj pli ol 20 jaroj, helpate de la ŝtato, la komunumanoj de diversaj naciecoj disvolvis la spiriton “sinapogi sur propraj fortoj kaj peneme lukti kontraŭ malfaciloj”, konstruis multajn lagetojn kaj akvokonservejojn. Ĉe la rivero Tuoniang oni konstruis multajn pumpstaciojn kaj malgrandajn hidroelektrajn staciojn, kiuj ne nur liveris al la montanoj akvon bezonatan en produktado kaj vivado, sed ankaŭ elektron por lumigado.

En la sekvanta tago ni kaj kamarado Li Guohiang venis al la hejmo de Li Guangming, vicsekretario de la partia filio de Puhe-brigado. La mastro regalis nin per bovloj da sakeo farita el glueca rizo. Li diris: “Bonvolu gustumi la dolĉan sakeon de ni jaŭ-oj!” Ni eltrinkis la sakeon je unu spiro kaj la mastro ekridis kontente. Poste li prezentis al ni tason da teo dirante: “Trinku la akvon de unuiĝo.” Kaj li rakontis al ni pri la akvo de unuiĝo.

Antaŭ la Liberiĝo, pro agitado de bienuloj la tieaj amasoj ofte militis unu kontraŭ alia por akiri akvon. Tuj ĉe la montpiedo estas montvalo Vejlaĵ, kie jaŭ-aj regantoj kaj ĝuang-aj bienuloj agitis ĝuang-ajn kaj jaŭ-ajn amasojn al armita lukto, kio mortigis

kaj vundis multajn homojn. Post la Liberiĝo oni faligis la bienulojn kaj jaŭ-ajn tiranojn kaj ĉiuj naciecoj ĝuas egalan rajton kaj vivas kune en plena harmonio. Por solvi la problemon de akvo, ĝuang-aj kaj jaŭ-aj kadroj kaj amasoj interkonsiliĝis kaj decidis konstrui akvokonservejon en la valo Vejlaĵ kie okazis antaŭe armita lukto. Sub la helpo de frataj brigadoj oni konstruis en duonjaro akvokonservejon kun kapacito de 440,000 kubmetroj. Ni povas ne nur kontentigi la bezonon de homoj kaj brutoj de la du brigadoj de jaŭ-oj kaj ĝuang-oj, sed ankaŭ ŝanĝis la 17 hektarojn da sekaj kampoj en irigaciatajn kampojn.

Tie ni vizitis multajn akvoturbinajn pumpstaciojn sur la rivero Tuoniang. Irante kontraŭ la fluo, ni vidis multajn altajn akvobaraĵojn kaj akvotubojn etendiĝantajn de la rivero sur montojn. Sur ili serpentis irigaciaj kanaloj liverantaj akvon al ŝtuparaj kampoj. En iu akvoturbina pump- kaj elektro-stacio junulo senŝeligas rizon por komunumanoj. Li estas teknikisto Li Ĵencaĵ de la produkta grupo Nalong. Li rakontis al ni pri la konstruado de la stacio.

En vintro de 1968 lia produkta grupo kun multaj mjaŭ-aj komunumanoj decidis konstrui pump- kaj elektro-stacion sur Tuoniang-rivero. Informiĝinte pri la ĝojiga afero, diversnaciecaj komunumanoj de 8 proksimaj grupoj venis por helpi. En sincera kunlaboro kaj reciproka respekto ili plene utiligis la avantaĝon de sia nacieco. Jaŭ-aj komunumanoj iris sur altajn montojn por haki arbojn kaj prepari kalkon. Ĝuang-aj komunumanoj kiuj bone scias naĝadon konstruis bazon sub la akvo kaj elakvigis sablon. Mjaŭ-aj kaj han-aj komunumanoj estas lertaj en jungo de ĉevaloj kaj prenis sur sin la taskon de transportado. Ĝoja konkuro regis la konstruejon. Per duonjaro ili finkonstruis la baraĵon kaj akvoturban pump- kaj elektro-stacion sur la rivero kaj kondukis akvon sur monton 47 metrojn altan. Per tiu stacio oni ne nur solvis la problemon de akvo bezonata por homoj kaj brutoj kaj

problemon de irigaciado de pli ol 20 hektaroj da sekaj kampoj, sed ankaŭ liveras elektron por lumigado.

En brigado Janla ni vizitis alian akvoturbinan pumpstacion, kiu kondukas akvon el branĉo de Tuoniang-rivero sur altan monton. Kaj irigacia kanalo serpentanta ĉe la montotalio kun longeco de 10.5 km. estas konstruita tie. En la konstruado la komunumanoj renkontis nemalmultajn malfacilojn, kiuj ekzamenis ne nur la volon sed ankaŭ la moralon de la konstruantoj. Kiam la konstruado progresis ĝis la Simio-monto, ĝi estis barita de kruta rokmuro. La konstruantoj bone sciis, ke unuiĝo estas forto por venki malfacilojn. Sub la gvido de kadroj mjaŭ-aj kaj ji-aj komunumanoj konkure anoncis sin por la danĝera laboro de dinamitado de rokoj, kaj neniu povis malkonsili la alian. En la fino oni elektis kelkajn el ambaŭ naciecoj por dinamiti la rokon. Dank' al la komuna klopodado glitemaj

roktecoj estis forigitaj kaj la kanalo trairis la lokon.

En vizitado ni vidis la gigantajn fruktojn de harmonia kuna batalado de diversaj naciecoj por konstrui sian hejmlokon.

Antaŭ la Liberiĝo tieaj loĝantoj neniam vidis maŝinon. Nun la komunumo jam havas traktorojn, dizelojn, rizidplantilojn, senŝeligajn maŝinojn, dispecigajn maŝinojn, draŝmaŝinojn k.a. La maŝinoj liberigis la komunumanojn el pezaj laboroj. Antaŭe de frua mateno ĝis profunda nokto ĉie oni povis aŭdi pezan sonon de rizopistado. Sed nun la virinoj por ĉiam adiaŭis tian pezan laboron. Nun, kiam falis la nokta kurteno, lampoj punktis la noktan bildon formitan de vilaĝoj sur altaj montoj kaj apud riveroj. Oni legas en lamplumo, aŭskultas radiodisaŭdigon aŭ lernas brodadon... Noviĝis la fizionomio de la vilaĝoj apud la senfina fluo de Tuoniang-rivero.



Komunumanoj de Bada-brigado rikoltas rizon.

JANG GUANGHUA:

Mia Familio



La aŭtoro kaj lia edzino

ANTAŬ nelonge mi kaj miaj fratoj laborantaj en aliaj lokoj interkonsentis reveni hejmen en sama tempo por vidi nian patrinon. Mia patrino estas jam preskaŭ sepdek-jara, sed tre sana. Ni feliĉe kolektiĝis kaj sentis nin eksterordinare ĝojaj pro ŝia bona farto kaj la feliĉa vivo de nia familio. Kun larmoj en la okuloj panjo diris emocie: “Kiel bone estus, se via patro ankoraŭ vivus!” Ŝiaj vortoj rememorigis al mi multajn pasintaĵojn.

ALINOMIGO DE MIA PATRO

Antaŭ la Liberiĝo nia familio havis ok membrojn. Mia patro aspiris, ke nia familio povu vivi en feliĉo, kaj speciale petis aŭguriston alinomi lin “Hingvang” (t.e. prospero). Kvankam lia nomo estis ŝanĝita, tamen nia familio ne prosperiĝis. Tiam la tero, montoj kaj arbaroj de niaj mjaŭ-vilaĝoj estis proprigitaj de mjaŭ-tiranoj. Ĉiujare ni devis senpage servi al mjaŭ-tiranoj en diversaj flankoj krom pago de 85% de niaj rikoltaĵoj kiel impostoj. En plejparto de la tuta jaro ni devis plenigi nian stomakon

per sovaĝaj fruktoj kaj herboj kaj nin vestis per palmofolioj kontraŭ malvarmo. Tiam en mjaŭ-vilaĝoj cirkulis jena kanto: “La mjaŭ-tiranoj kun kruela koro monigas sangon de l’ farmuloj, la mjaŭ-tiranoj kun vipura koro vinigas la medolon de l’ farmuloj!”

En iu printempo nia kabano estis forbruligita, kaj ĝuste tiam mjaŭ-tirano venis al nia hejmo kaj devigis nin pagi nian ŝuldon al li. Nia familio havis ja nenion, per kio do ni povis ŝtopi la ŝuldon? La mjaŭ-tirano alsendis amason da lakeoj, kiuj terure batis mian patron kaj forpelis nian familion el la vilaĝo. Ni estis devigitaj iri en densan arbaron en profunda montaro, loĝi en kavernoj kaj nin vivteni per sovaĝaj batatoj. Tiel ni vivis tri jarojn same kiel sovaĝuloj. Mia patro estis serioze vundita pro la batoj, kaj post nelonge kun indigno li forlasis la mondon.

Post la morto de mia patro nia vivo fariĝis ankoraŭ pli malfacila. Panjo pruntis de la mjaŭ-tirano dekalitron da maizo. Pro analfabeteco de mia patrino, la mjaŭ-tirano

trompis ŝin kaj skribis en la bilon tri dekalitrojn anstataŭ unu. Post du jaroj, la mjaŭ-tirano devigis nin redoni al li la kapitalon kun interezo sume 12 dekalitrojn da maizo. Li sciis, ke ni ne povis ŝtopi la ŝuldon kaj devigis mian 12-jaran fraton labori por li kiel sklavo. La patrino senhelpe lasis ilin fortreni ŝian filon. Iun tagon mia patrino alvokis min, miajn duan fraton kaj fratinojn kaj kun larmoj en la okuloj diris karesante niajn kapojn: “Mi naskis vin, sed ne povas vin vivteni. Vi mem serĉu rimedon por vin vivteni!” Post tio la dua frato kaj fratino laboris ĉe iu riĉulo. Ankaŭ mi foriris de la patrino kaj du fratetoj por vivi ĉe la onklo.

La frosta vintro forpasis kaj varma printempo komenciĝis. La suno heligas mjaŭ-vilaĝojn. En la jaro 1950 mia hejmloko liberiĝis. La Popola Liberiga Armeo helpis nian tutan familion denove kuniĝi. La popola registaro donis al ni grenojn, vestojn, kampojn kaj domojn. De tiam ni ne suferas plu la subpremon kaj ekspluaton de tirano. Nun nia familio estas granda familio kun 21 membroj, el kiuj kvin laboras en popola komunumo kaj ok okupiĝas pri aliaj profesiaj laboroj. Ĉiufoje kiam ni parolas pri la ŝanĝiĝo de nia familio, ni pretervole kantis nian kanton:

*Se ne brilus la printempa suno al mjaŭ-
monto,*

*ne disflorus pompe ĉe ni l' buntaj floroj;
se nin ne gvidadus Kompartio kaj Pre-
zidanto Maŭ,*

kiel povus esti nia hodiaŭa ĝojo?

ANTAŬE SKLAVO, NUN MASTRO

Mia plejaĝa frato ofte rakontas al la infanoj pri sia mizera knabeco por ke ili ne forgesu la mizerojn suferitajn de iliaj gepatroj, kaj pli amu la hodiaŭan feliĉon.


En la malnova socio mia plejaĝa frato vivis kiel ŝarĝbruto. Post kiam li estis kaptita de la tirano, la lasta devigis lin

bredi du furiozajn ĉevalojn. Foje mia frato paŝtis ĉevalojn sur monto, iu virĉevalo furioziĝis kaj forkuris debridiĝinte. Vespere, tion sciinte, la tirano solide lin batadis tute ne permesante lin fari klarigon kaj ordonis lin tuj serĉi la ĉevalon. Malgraŭ doloro kaj malsato mia frato transgrimpis monton post monto kaj trairis valon post valo en profunda montaro, frekventata de sovaĝaj bestoj, li fine trovis la ĉevalaĉon nur en la sekvinta vespero. Krom paŝtado li ankaŭ devis servi al la filo de la tirano. La knabaĉo ofte ordonis mian fraton rampi sur planko por ke li rajdu sur la dorso de mia frato, kiel sur ĉevalo, kaptante harojn de mia frato per unu mano kaj vipante lin per la alia. Se mia frato montris signon de malobeo, li tuj ricevis batojn.

Estas la Popola Liberiga Armeo, kiu liberiĝis mian fraton el la faŭko de la tirano. Sub la helpado de ĈPLA, li iom post iom komprenis, ke lia suferplena vivo en la pasinteco estis rezultato de subpremado kaj ekspluatado de la kuomintangaj reakciuloj kaj mjaŭ-tiranoj. Li decidis iri la revolucion vojon sub la gvido de la Kompartio. Kiam ĈPLA-anoj iris en la montaron por ekstermi postrestantajn kuomintangajn bandidojn, li aktive servis al ili kiel kondukanto; dum la agrara reformo, li kune kun samvilaĝanoj batalis kontraŭ mjaŭ-tiranoj. La partia organizo aktive edukis lin, kaj plurfoje sendis lin kaj aliajn kadrojn de nacimalplimulto viziti aliajn lokojn por lerni. Poste li movis siajn vilaĝanojn organizi interhelpan grupon kaj kooperativon, kaj estis elektita kiel estro de la kooperativo kaj labora modelo. Li ĉeestis la Kunvenon de Laboravangardo de Guanghi. Ĝuste tiam li glorie aliĝis al la Komunista Partio de Ĉinio.

Por plue lin klerigi kaj altigi lian laboran kapablon, la Partio sendis lin studi en la Bejse-a Industria Lernejo kaj Guanghi-a Instituto de Nacimalplimulto. Nun li estas vicestro de la trafika fako de la Longlin-a Diversnacieca Aŭtonoma Gubernio.





La plejaĝa frato de Jang Guanghua (la dekstra) faras mezuradon por konstrui ŝoseon.

MALRIĈA KNABO STUDENTIĜIS

Post la Liberiĝo, sub zorgo de la Partio kaj la popola registaro, en nia montvilaĝo stariĝis lernejo. Mia dua pliaĝa frato kaj du fratetoj diplomiĝis el la lernejo kaj havas profesiojn. Eĉ mi kriplulo de infanaĝo jam povis studi en alta lernejo, kio estis neimagebla eĉ en sonĝo en la pasinteco.

Kiam mi estis dujara, la kruela edzino de la tirano min batis kaj kripligis mian maldekstran manon. Poste kiam mi akiris multe da kompreno pri la mondo, mi forte malamis la tutan familion de la tirano kaj ankaŭ ofte maltrankviliĝis pri mia estonteco.

En la jaro 1953, en nia vilaĝo stariĝis elementa lernejo, kaj instruisto venis al mia hejmo por konsili min viziti lernejon. Sed panjo diris: “Kian utilon lernado povos porti al tia kriplulo?” La instruisto respondis: “Sub la gvido de Prezidanto Maŭ ni malriĉuloj ne nur devas esti liberigitaj en politiko, sed ankaŭ devas fariĝi mastroj en kulturo. Sendu vian knabon al lernejo. Ni helpos lin, se li renkontos malfacilojn.” Sekve, mi ekvizitis lernejon.

En la jaro 1963, kiam mi diplomiĝis el mezlernejo, partia organizo sendis min al politika fakultato de Guanghi-a Instituto de Nacimalplimulto. En la instituto, ni studentoj de nacimalplimulto ĝuis senpagajn manĝon, vestojn kaj subvencion por ĉiutaga vivbezono. Por ke ni lernu bone la instituto asignis instruistojn por helpi nin post lecionhoro kaj ofte lasis nin viziti fabrikojn kaj kamparon por lerni. Pro tio, nia scio senĉese vastiĝis kaj nia politika konscio senĉese altiĝis. En iu jaro ni venis al la tagnokte sopirata Pekino kaj estis akceptataj de respondeculoj de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio. Dum lernado en la instituto mi aliĝis al la Komunista Partio de Ĉinio.

Post diplomiĝo el la instituto, kun forta volo konstrui la hejmlokon, mi revenis al la Longlin-a Diversnacieca Aŭtonoma Gubernio kaj estas asignita labori en ĝia revolucia komitato. En la lastaj jaroj la granda ŝanĝiĝo de la hejmloko multe ekscitis mian entuziasmon en laboro. Mi decidis kontribui mian tutan vivon al la konstruado de nia patrolando por ke ĝi prosperu paŝon post paŝo.

La Nacimalplimulto de Guanghi

de ZONG GUANGĜAN

LA Guanghi-a Ĝuang-nacia Aŭtonoma Regiono situas en la suda parto de nia lando, sude ĉe Bakbo-golfo kaj najbare al la Vjetnama Demokratia Respubliko en la sudokcidento. Ĝi havas pli ol 28,000,000 loĝantojn kaj ampleksas areon de pli ol 230,000 kvadrataj kilometroj.

Guanghi kuŝas en la subtropika zono, ĝia klimato estas milda kaj produktaĵoj abundaj. La regiono konsistas ĉefe el montoj kaj montetoj.

Ĝia pejzaĝo en la norda parto estas ĉarma. Estas diraĵo: “La montoj kaj akvoj de Gujlin estas la plej belaj en la tuta lando”, kaj “la montoj kaj akvoj de Jangŝuo estas pli superaj ol tiuj de Gujlin”. Krom rizo, maizo kaj aliaj agrikulturaj plantaĵoj, Guanghi ankoraŭ produktas aleŭritoleon, teoleon, ilicion, fenkolon, cinamon, kasion, pseŭdo-ginsengon (*Panax pseudo-ginseng*) kaj aliajn ekonomiajn plantaĵojn kaj rarajn drogojn. Guanghi estas unu el la plej grandaj produktaĵoj de aleŭritoleo de nia

Ĉengjang-ponto, antikva konstruaĵo de dung-nacieco



lando, kaj ĝia produktokvanto de ilicio kaj fenkolo okupas la unuan lokon de la tuta lando. Ĝia Ginghi-gubernio estas ĉefa produktejo de pseŭdoringenso de nia lando. En la regiono subtere sin rezervas fero, karbo, tungsteno kaj mangano sume pli ol 40 specoj de mineraloj. Ĝia nordokcidenta parto estas nia grava produktejo de lignoj.

Dum miloj da jaroj, sur tiu fekunda tero loĝas 12 naciecoj de ĝuango, hano, jaŭo, mjaŭo, dungo, molaŭo, maŭnano, hujo, jio, ĝingo, ŝujo kaj golaŭo. De longe tiuj nacimalplimultoj kaj hanoj kune laboras, batalas kaj faris kontribuon por konstrui nian grandan patrolandon.

Ĝuangoj estas la plej multnombraj el la nacimalplimultoj de Ĉinio. La nombro de ĝuangoj loĝantaj en Guanghi estas ĉirkaŭ dek milionoj kaj konsistigas pli ol 90% de la totala nombro de tiu nacieco en nia lando. La ĝuang-nacieco havas longan historion kaj riĉan nacian kulturon. La antikvaj bildoj gravuritaj sur rokmuroj ĉe la bordoj de la riveroj Minggiang kaj Zuogiang en la sudokcidenta

Guanghi estas gravaj kulturaj restaĵoj de ĝuangoj. Tiuj bildoj estis gravuritaj sur krutaj rokmuroj. Iuj bildoj kun fortaj strekoj kaj vivecaj figuroj havas altecon de kelkdek metroj kaj larĝecon de pli ol cent metroj, kaj montris saĝon kaj kreivon de la laboranta ĝuang-popolo. Ĝuang-brokato estas fama tradicia metiartaĵo kun historio de pli ol mil jaroj. Kaj ĝi karakteriziĝas per freŝeco, beleco, helkoloroj, fortikeco kaj forta nacia gusto. Kupra tamburo estas alia konata metiartaĵo de ĝuangoj kun historio de ĉirkaŭ du mil jaroj. La granda tamburo kun diametro de pli ol tri metroj pezas pli ol 500 kilogramojn. Sur ĝia kupra surfaco estas delikataj kaj belaj desegnoj. Ĝi estas unu el la plej ŝatataj muzikiloj de ĝuangoj. La ĝuangoj lertas en kantado por speguli la vivon kaj batalon kaj esprimi sian sentimenton. Inter la popolanoj cirkulas la parolliteraturo.

La molaŭoj, maŭnanoj kaj ĝingoj ĉiuj loĝas en Guanghi. Molaŭ-nacieco havas pli ol 60,000 membrojn. Ili ŝatas kanti popolajn kantojn, kaj

Tan Fenghian, (la meza, de maŭnan-nacieco), vicsekretario de Huangian-gubernio interparolas kun komunumanoj.



ĉiu vilaĝo havas siajn kantistojn. Preskaŭ ĉiuj kantoj estas prezentataj en la dialoga formo kaj ĉefe per la hana lingvo. Maŭnan-nacieco kun pli ol 20,000 loĝantoj, kiuj multe entreprenas flankokupajn produktojn krom agrikulturo, kaj viandaj bovoj estas speciale bredataj de la maŭnanoj. Iliaj metiartaĵoj estas tinkturitaj teksaĵoj, diversaj objektoj faritaj el bambuo kaj arĝento k.a. Malpeza, bela kaj fortika ĉapo plektita el bambuo estas aparta metiartaĵo de la maŭnanoj. Ĝing-nacieco kun pli ol 5,000 loĝantoj vivas sur la tri insuloj Vutoŭ, Livej kaj Ŝanhin en Bakbo-golfo kaj ĉefe entreprenas fiŝadon. Post la Granda Proleta Kultura Revolucio, ili kreis pli ol 400 hektarojn da kampoj sur marbordoj por disvolvi agrikulturan produkton. Samtempe ili ŝanĝis la tri insuletojn en duoninsulojn per ligo de ili kun la kontinento.

La nacimalplimulto de Guanghi havas sian revolucionan tradicion. La fame konata kamparana revolucia movado de la Tajpinga Ĉiela Regno en la jaro 1851 okazis en Gintian-vilaĝo de Gujping-gubernio de Guanghi. Kiam la revolucio eksplodis,


ĝuangoj, jaŭoj kaj aliaj nacimalplimultaj popoloj aktive partoprenis en ĝi. Dum la batalado aperis grupo da gvidantoj de kamparana revolucio el ĝuangoj kaj jaŭoj. Post la naskiĝo de la Komunista Partio de Ĉinio, avangardaj elementoj de ĝuang-nacia popolo starigis sian lokan partian organizon, sub kies gvido popolanoj de diversaj naciecoj faris revolucionan batalon, okazigis la konatan Bajse-insurekcion kaj fondis la Laboristan-Kamparanan Ruĝan Armeon kaj Laboristan-Kamparanan Demokratian Regpotencon. La revolucia batalo de diversnaciaj popolanoj de Guanghi daŭre persistis ĝis la Liberiĝo de la tuta lando en 1949.

Post la fondiĝo de la nova Ĉinio, la diversnaciaj popolanoj de Guanghi firme subtenis nacian regionan aŭtonomecan politikon de la Komunista Partio de Ĉinio, kaj unu post alia starigis naciajn aŭtonomajn guberniojn en la koncentre loĝataj regionoj de nacimalplimulto. En marto de 1958, oficiale fondiĝis la Guanghi-a Ĝuang-nacia Aŭtonoma Regiono. Nun, la nombro de nacimalplimultaj kadroj de la tuta regiono pliiĝis de pli ol 900 en la



Dungoj kaj hanoj de la Sangiang-a Dung-nacieca Aŭtonoma Gubernio deponas monon en iu ŝparkaso de la Ĉina Popola Banko.

Jaŭa laboristino Lan Hiaŭlian de la Fabriko de Tritikaj Tukoj de Duan-gubernio. Pli ol 90 procentoj de la laboristoj de tiu gubernio estas anoj de nacimalplimulto.



komenco de la Liberiĝo ĝis pli ol 60,000. Kamarado Vej Guoking, la unua sekretario de la partia komitato kaj estro de la revolucia komitato de la aŭtonoma regiono, estas ĝuango. El la gvidantaj kadroj de pli ol 40 aŭtonomaj gubernioj koncentre loĝataj de ĝuangoj pli ol duono estas ĝuangoj.

Post la Liberiĝo, la diversaj naciecoj de Guanghi estas ne nur liberigitaj en politiko, sed ankaŭ akiris grandan disvolvon en ekonomio, kulturo, eduko kaj higiena afero. Antaŭ la Liberiĝo, la industria kaj agrikultura produkto de Guanghi estis tre postiginta, sed nun ĝi havas ŝtalan, feran, karban, elektran, kemian, agrikulturmaŝinan, tekstilan kaj aliajn industriajn branĉojn. En la tuta regiono estas starigitaj pli ol 7,000 grandaj, mezaj kaj malgrandaj fabrikoj kaj minejoj, kiuj povas produkti traktorojn, aŭtojn, elektrajn motorojn, dizelojn, diversajn ilmaŝinojn kaj ekipaĵojn por kemia industrio. La produktokvanto de greno pliiĝis jaron post jaro dank' al akvoutiliga konstruado, aplikado de agrikulturaj maŝinoj, grandskala fundamenta konstruado de kampoj kaj terkulturado en scienca metodo. En la pasinteco, trafiko de Guanghi estis malfacila. En la vasta kamparo kaj malproksimaj montregionoj oni devis grimpadati montdeklivon por iri eksteren kaj la transporto dependis de homfortoj. Nun,

aŭtoj povas atingi pli ol 94% de popolaj komunumoj de la tuta regiono, kaj la totala longeco de fervojo estas pli ol duoblo de tiu antaŭ la Liberiĝo.

La kultura kaj eduka afero estas en prospero. Antaŭ la Liberiĝo, en Guanghi troviĝis malmulte da lernejoj. La plejparto de la kamparanoj estis analfabetoj. En iuj nacimalplimultaj lokoj troviĝis neniu klerulo, oni notis aferon per lignografuro kaj kalkulis per ŝtonoj. Post la Liberiĝo, kun pliboniĝo de la popola vivo, ankaŭ la eduka afero rapide disvolviĝis. Nun, en la vasta kamparo oni ĝenerale starigis elementajn lernejojn, kaj iuj brigadoj starigis mezlernejojn. La tuta regiono havas 10 altajn lernejojn. Profesiaj kaj amatoraj artaj taĉmentoj aktivis ĉie tra la regiono. Krome, fadena disaŭdigo funkcias en la vasta kamparo.

Antaŭ la Liberiĝo, tie cirkulis diversaj epidemioj. Tiam al la laboranta popolo mankis kuraco kaj medikamentoj, tial ĉiujare multaj homoj mortis de malsano. Nun, ĉiu gubernio havas sian hospitalon, ĉiu komunumo kaj brigado kuracejon, kaj ĉiu produktogrupo sian kamparanan kuraciston. Variolo, ĥolero kaj aliaj epidemiaj malsanoj jam estas eliminitaj, kaj skistosomo en 17 gubernioj fundamente likvidiĝis dank' al energia preventado kaj kuracado.

NOVAJ ĈINAJ ESPERANTAJ ELDONAĴOJ

Kokeriko en Noktomezo (Bildrakonto)

72 p.

18.5 × 13 cm.

Prezo: £ 0.06 US\$ 0.15 Enoj 60 Gld. 0.65

Pejzaĝoj de Gujlin (Ilustritaj poŝtkartoj)

12 pecoj

Prezo: £ 0.08 US\$ 0.18 Enoj 80 Gld. 0.75

Eldonis: Fremdlingva Eldonejo, Pekino, Ĉinio

Distribuas: Libro servo de Ĉina Esperanto-Ligo

(P.O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio)

Mendeblaj ankaŭ ĉe la perantoj de El Popola Ĉinio

Aŭskultu

Esp-an Disaŭdigon de Radio Pekino

Por Eŭropo

Pekina Tempo Sabato k Dimanĉo
4:00—4:30

GMT Vendredo k Sabato
20:00—20:30

Ondoj(m) 43 33 31

Por Japanio, Koreio


Pekina Tempo Sabato k Dimanĉo
19:00—19:30

Ondoj(m) 47 40

Por Sudorienta Azio

Pekina Tempo Sabato k Dimanĉo
20:30—21:00

Ondoj(m) 30 25



ELEKTRONA KOMPUTERO DE INTEGRA CIRKVITO

En nia lando naskiĝis la unua elektrona komputero de integra cirkvito kiu povas fari ĉiusekunde milionon da operacioj. Ĝi estas kune projektita kaj prove produktita de la Pekina Universitato, la Aŭtomata Telefona kaj Elektro-aparata Fabriko de Pekino kaj aliaj. Prova kalkulado de pli ol 3,000 horoj dum pli ol duonjaro montris ke ĝi estas bonkvalita kaj ĝia funkcio stabila kaj la ĉefaj projektitaj normoj estas jam atingitaj.

Ĝia vortolongeco estas 48 binaraj ciferoj, la kapacito de ĝia interna memora maŝino estas 130,000 literoj kaj ĝi sume enhavas 22 eksterajn instalaĵojn de 9 specoj. Dum la prova kalkulado, laboranto iam solvis per ĝi algebran ekvacion de la ducenta ordo kaj bone plenumis la kalkuladon sen eraro en nur dekelkaj sekundoj; por plenumi tiun kalkulon 100 homoj devas labori unu jaron. Per ĝi la laboranto ankoraŭ sukcese faris kalkulojn de kompleksa projekto de konstruaĵo, meteoantaŭdiron kaj traktis materialon pri tertremo kaj aliaj.

NOVA DISVOLVIĜO DE LINIA LABORO SUB TENSIDO

Linia laboro sub tensio estas grava teknika renovigo komencita de vastaj amasoj de elektraj laboristoj, kadroj kaj teknikistoj en 1958. Antaŭ la apliko de tiu tekniko, por ripari elektran linion aŭ ekipaĵojn en ĝi oni devis rompi la kurenton, kaj pro tio multaj fabrikoj kaj minejoj devis ĉesigi sian produktadon. Post la


apliko de tiu tekniko, elektro povas esti senĉese provizita por garantii la produktadon de industrio kaj agrikulturo. Ekzemple la Elektroproviza Buroo de Pekino provizis 22,800,000 kilovathorojn pli multe da elektro, de aŭgusto de 1972 ĝis julio de 1973, dank' al la apliko de tiu tekniko. Nuntempe, tiu tekniko estas vaste aplikata en ĉiuj lokoj escepte de malmultaj regionoj de nia lando. La elektroprovizaj burooj de Ŝanhajo, Kantono, Anŝan, Vuhan, Ĝengĝoŭ, Ĉangŝa kaj aliaj lokoj fondis ankaŭ virinajn grupojn por linia laboro sub tensio. Tiu tekniko povas esti aplikata ne nur en kontrolo kaj riparo de elektro-linioj, sed ankaŭ en reformo de tuta linio, kaj ne nur sur elektraj linioj, sed ankaŭ en transformatora stacio. En la sudo de nia lando iuj lokoj eĉ sukcesis fari tiun laboron en pluvo; kaj la Elektroproviza Buroo de Anŝan kreis metodon de libera linia laboro sub tensio.

PLI MULTAJ ŜPARDEPONOJ

En 1973 pli multiĝis la ŝpardeponoj de niaj urbanoj kaj vilaĝanoj. Laŭ la statistiko je la fino de la lasta aŭgusto, la ŝpardepona mono de urbanoj kreskis je 13.1% kaj tiu de vilaĝaj komunumanoj kreskis je 21%, kompare kun tiu de la sama periodo de 1972. Kaj multe kreskis ankaŭ tiuj de urbanoj en la regionoj de Hingiang, la Interna Mongolio, Ninghia, Guanghi kaj lokoj dense loĝataj de nacimalplimulto, ekzemple tiu de la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio kreskis je 17.3%, kaj tiu de la Guanghi-a Ĝuang-nacia Aŭtonoma Regiono je pli ol 18%.

Sub la gvido de diversnivelaj kompartiaj organizoj laborantoj de la Popola Banko kaj kreditaj kooperativoj rigore plenumas la politikon de la Partio kaj la ŝtato pri protekto kaj kuraĝigo de la popolo en kaj al ŝpardepono.

En ĉi tiu regiono kun
loĝantoj de
multo...



Parto de la monta urbo Bajse

Picearo kulturata de la produkta
brigado Vangzi de Hilin-gubernio




Ŝtuparkampoj kreitaj de komunumanoj de ĝuang-
oj, mjaŭ-oj, ĵi-oj kaj han-oj de Hanŝan-brigado de
la Longlin-a Diversnacieca Aŭtonoma Gubernio





Ĝuang-a instruisto (la meza) kaj gestudentoj de jaŭ-, mulaŭ-, maŭnan- kaj ĝuang-naciecoj de la Bajse-a Medicina Kolegio kune esploras kaj distingas plantaĵojn en la drogherba ĝardeno.






Ĝuang-a kaj jaŭ-a komunumaninoj



Traktoristino Vang Hingliang





Akvofalo "Malvarma Fonto"





Geknaboj de la mjaŭ-a elementa lernejo de Nalong lernas ludi luŝengon (anĉan blovinstrumenton de tiu nacieco).





Brodita infanportilo de mjaŭ-nacieco

Ĝuang-naciecaj brokatoj



Popola tradicia arto — vaksa tinkturado





Jaũ-a danco *Goja Kanto* en *Olekameliaro* prezentata de arta trupo de Hilin-gubernio



Al la putoborejo

Virina Putobora Grupo sur Olekampo


de GJU HINHUA

SUR konstruejo de iu olekampo de nia lando aktive laboras virina putobora grupo, kiu fondiĝis laŭ la firma postulo de junulinoj.

En la unua printempo de la sepa jardeko, venis al la olekampo grupoj da intelektaj gejunuloj harditaj en la Granda Proleta Kultura Revolucio kaj reedukitaj de malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj. Inter ili troviĝis knabino nomata Guo Ĵong kun fortika korpo kaj gaja humoro. Apenaŭ ŝi atingis la olekampon, ŝi jam decidis lerni de Vang Ginhi, ferulo de la Daking-a Olekampo,

kaj preni sur sin plej malfacilan revolucionan laboron. Informiĝinte, ke la putoboristo estas avangardo de ekspluatado de olekampo, ŝi do petis kune kun siaj koleginoj: “Lasu nin virinojn esti putoboristinoj!”

Laboristoj tre ĝojis pro ilia granda decido. Sed iuj dubis: “Putoboristoj devas labori ĉiusezone eksterdome kaj estas ĉiam atakataj de vento kaj pluvo. Krome ili devas surgrimpi borturon 30-40 metrojn altan. Ĉu en tia peniga laboro la knabinoj kompetentas?”



Grupestrino Guo Ĵong (la maldekstra)

La knabinoj sonore respondis: “Ŝanĝiĝis la epoko, viroj kaj virinoj estas egalaj, kaj kion viroj povas fari, tion ankaŭ virinoj. Ankaŭ ni virinoj devas diligente lerni la peneman spiriton de Daking-aj laboristoj.”

Informiĝinte pri tio Caŭ Ĉanghin, estro de la Revolucia Komitato de la Putobora Komandejo, diris kun ĝojo: “Brave! Ili vere estas bonaj junulinoj kulturitaj de Maŭzedongpenso kaj nova generacio hardita en la granda kultura revolucio!” Ĉi tiu veterana boristo jam delonge volis kulturi novan generacion de virinaj boristoj por la patrolando. Kaj sub lia propono, la komandejo decidis fondi virinan putoboran grupon.

En la celebrado de la Internacia Virina Festo je la oka de marto, la virina putobora grupo fondiĝis. Guo Ĵong, Ma Ŝukin, Ĝoŭ Kingĝi kaj aliaj 24 junulinoj fariĝis la unuaj putoboristinoj de la olekampo kaj estis senditaj al sperta putobora grupo por lerno. En la unua tago, kiam ili venis al la putejo, ili sentis miron kaj ĝojon, rigardante la grandiozan borturon.

Ascendi la borturon estas la fundamenta tekniko por putoboristoj. Je la komenco, kiam ili ascendis

kelkajn metrojn sur la ŝtuparo, iliaj kruroj jam ekremadis. Kion fari? Ŝin ekzerci! Tio estis ilia decido. Kompartiano Ma Ŝukin eĉ ne kuraĝis surgrimpi domtegmenton kiam ŝi estis en kamparo, tial aliaj admonis ke ŝi laboru surkampe kaj ne sin ekzercu pri tio. Tamen ŝi diris: “Ĉu mi indas esti putoboristo, se mi ne povas eĉ surgrimpi borturon!” Rigardinte la vertikalan borturon, ŝi sin kuraĝigis kaj ekascendis supren laŭ la ŝtuparo. Unu, du, tri... dek metrojn ŝi grimpis, kaj tiam ŝi sentis ke la turo forte tremis pro la vibrado de bormaŝino. Ŝi iom sin kvietigis kaj daŭrigis la grimpadon kaj fine atingis la supron de la borturo.

Post la trejnado en pli ol unu monato, la knabinoj fundamente ekposedis diversajn teknikojn de putoborado.

En la 5-a de aprilo, 1970, sur la alta borturo pendis du rubandoj kun simetriaj versaĵoj:

*Heroas la gefiloj ĉinaj kun mirinda volo,
En putobora l' histori' aperas nova artikolo.*

La putoboristinoj kun arĝenta sekuriga kasko sur kapo kaj en laborvesto oficiale ekboris kaj sukcese faris la unuan puton per malpli ol kvar tagoj.

En julio de 1970, por adapti la laboron al la nova situacio de olekampa konstruado kaj altigi la boran rapidecon de ĉiuj putoboraj grupoj, la komandejo decidis ke la grupo n-ro 1002 provu bori unu puton per unu tago kaj unu borilo.

“Tio ja estas spirito de la ĝenerala linio!” La knabinoj plientuziasmiĝis kaj estis pretaj je la batalo. Ili diris: “La ĝenerala linio postulas ke ni streĉu plene la energion kaj strebu forte antaŭen, ĉu ni ne povas fari tion, kion viraj grupoj povas?”

Iu petolema junulo ŝerce diris: “Kiom da putoj vi jam boris? Se vi povos sukcesi en tia puto, mi do elfosos unu per fingroj!”

La knabinoj unuvoĉe respondis: “Oni timas ne malfacilecon sed pigrecon. Se oni praktikas plurfoje, ĉu tio estos ankoraŭ neefektivebla?”

La unuanimaj putoboristinoj decidis tutforte fari provan boradon de tia puto. Ili invitis veteranan laboriston kiel konsiliston kaj faris sufiĉan preparon, kaj en la dua tago post la eklaboro de la grupo n-ro 1002 ankaŭ ili komencis sian boradon.

Glate iris iliaj matena kaj taga deĵoroj, sed en la nokta deĵoro kiam restis nur cent metroj, kiujn ili baldaŭ antaŭdate plenumos, okazis abrupte neatendaĵo: Likis la tertavolo kaj forkuris la miksitaj fluaĵo bezonata en borado. Se la fluaĵo ne povos

circuli normale, tuj disfalos la putomuro. Tio ne nur malsukcesigos la boradon, sed ankaŭ kaŭzos akcidenton de borilo-enteno. Ili unuflanke sendis homon por venigi cisternokamionon de akvo por fari miksitajn fluojn kaj aliflanke pripensis urgajn metodojn. Kiam ili trovis akvujojn en la apuda loko, la ĉefboristino Guo Ĵong vokis: "Tuj alportu la akvon!" Je tio knabinoj tuj rapidis al la akvujo, iuj kun sitelo kaj aliaj kun sia sekuriga kasko. Ili rapide portadis la akvon kaj ĉesigis tion nur post la alveno de la cisternokamiono.

Post la tria horo frumatene aŭroriĝis la oriento. Nur per pli ol 19 horoj, la junulinoj sukcesis bori la duan tian puton de la olekampo.

En la ceremonio por celebri la sukceson, la putobora komandejo honoris la virinan putoboran grupon kaj la putoboran grupon n-ro 1002 per ruĝaj standardoj.

Alte tenante la ruĝan standardon, la virina putobora grupo batalis de unu putejo al alia kaj venkis unu malfacilon post alia. En la pluva sezono, koto kovris la olekampan konstruejon. Pro tio kamionoj kaj argano ne povis iri en novan putejon. Tiam la putoboristinoj kaj aliaj kamaradoj per vektoj kaj traktoroj transpor-

tis la tutan ekipaĵon al la loko. Kiam ventego kun flava sablo volvis la stepon, homoj ne povis firme stari kaj malfermi siajn okulojn. Neniom timante tion, la putoboristinoj surgrimpis la borturon kaj laboris tie.

En decembro de 1972, ili laŭdate plenumis sian tutjaran taskon. Tiam la komandejo decidis antaŭdate komenci la boradon en marĉo kie oni ne povos eniri je la venonta somero, utiligante la glaciigan sezonon, por plenumi parton de la tasko de 1973 antaŭ la jarfino. La putoboristinoj tuj rapidis al la nova konstruejo kaj starigis tie borturon sur la glacia tavolo. Post kelktaga penado en frosta ventego, ili venke plenumis tiun ĉi taskon.

Dum la lastaj pli ol 3 jaroj, la virina putobora grupo senĉese pligrandiĝis kaj nun ĝi jam havas 80 membrojn. Ankaŭ la putejoj boritaj de ili plimultiĝis: En 1970, ili boris 35 putejojn per unu bormaŝino; en 1971, 62 per unu kaj duono (la nova maŝino estis aldonita en la lasta duono de la jaro); kaj en 1972, 106 per du. En la jaro 1973, ili plue antaŭenmarŝis kaj ankaŭ gajnis novan sukceson. La grupo estas renoma pro sia avangardeco ĉu en rapideco kaj kvalito, aŭ en malaltigo de kosto kaj bona administrado, kaj ĝi fariĝis unu el la progresintaj kolektivoj de la tuta olekampo.



Kamarado Cai Ĉanghin (dekstre) zorgas pri la progreso de la putoboristinoj.

Surmara Servo-ŝiparo

SUR la Flava Maro sudoriente de Giaŭdong-duoninsulo de nia lando aktivas surmara servoŝiparo de la Kompanio de Akvoproduktaĵoj de Vendeng-gubernio de Ŝandong-provinco.


La nomita kompanio antaŭe estis komerca entrepreno, kiu starigis 14 filiojn en marhavenoj por provizi fiŝistojn per bezonataj objektoj kaj aĉeti akvoproduktaĵojn de la lastaj. Post la Granda Proleta Kultura Revolucio la fiŝkaptado de tiu gubernio akiris tre rapidan disvolviĝon kaj mekanikigo pliiĝis 4-oble, ankaŭ plimultiĝis surmaraj fiŝistoj. Por pli bone servi al la fiŝistoj, vintre de 1970 la nomita kompanio sendis 14 grupojn al 110 fiŝkaptaj brigadoj de la tuta gubernio por fari enketadon. La fiŝistoj esperis, ke la kompanio aĉetu akvoproduktaĵojn tuj ĉe la fiŝejoj. Dum analizado

pri la opinioj de la fiŝistoj, laboristoj kaj oficistoj de la kompanio diris: “La postulo de la fiŝistoj estas racia, ni do klopodu por ilin kontentigi!” Poste la kompanio starigis surmaran servoŝiparon konsistigatan de 17 ŝipoj. Dum la tempo por fiŝado la servoŝipoj navigis al fiŝejoj por aĉeti marproduktaĵojn kaj provizi la fiŝistojn per bezonataj objektoj. En la pasinta jaro, tiu servoŝiparo pliiĝis de 17 ĝis 23 ŝipoj, kaj ankaŭ ĝia servo plivastiĝis. Ĉiam kiam fiŝistoj vidas la servoŝipojn, ili krias ĝoje: “Jen, kamaradoj de la ‘postfronto’ alvenas nin helpi!”

La ŝipo Luŝuj 22 de la servoŝiparo funkcias kiel surmara magazeno. Ĝiaj maldekstra kaj dekstra holdoj estas plene ŝarĝitaj per dolĉakvo kaj mazuto, kaj sur ĝiaj ferdekoj amasiĝas diversaj porŝipaj objektoj, retoj kaj ĉiutagaj bezonaĵoj. Kiam la



Kamaradoj de la surmaraj servoŝipoj helpas fiŝistojn elŝipigi fiŝojn.



Provizi surmarajn fiŝistojn per dolĉa akvo

ŝipo alvenis al fiŝejo, la fiŝistoj veturigis siajn ŝipojn al ĝi unuj post aliaj, iuj por provizi sian ŝipon per mazuto aŭ per dolĉakvo kaj aliaj por aĉeti ĉiutagajn bezonaĵojn. Ĝi portas multe da oportunoj al la surmaraj fiŝistoj.

En la tagoj por fiŝado, la servoŝipoj laŭbezzone dividiĝis en kelkajn grupojn, por ke ili veturu respektive al la fiŝejoj por aĉeti freŝajn fiŝojn. Por ĝustatempe transporti la fiŝojn, la servoŝipoj kaj fiŝŝipoj interkontaktis per signaloj. Kiam iu fiŝŝipo hisis signalon, fiŝaĉeta ŝipo tuj veturis al ĝi por enŝipigi fiŝojn. Dum la plej okupata tempo de fiŝado, la laborantoj sur la ŝipoj tagnokte okupiĝas pri la aĉetado, por fari tion ili devas manĝi kaj ripozi alterne. Foje, tri fiŝaĉetaj ŝipoj ŝarĝis sin en 8 horoj per pli ol 100 tunoj da freŝaj fiŝoj de 15 fiŝŝipoj, tiel ke la lastaj tiutage kaptis plie 25 tunojn da fiŝoj. Estro de iu fiŝbrigado Ju Ĝongze diris: "Antaŭe, post unutajda fiŝado, ni devis perdi du tajdojn de fiŝkaptado pro reveno al la haveno por elŝipigi la kaptitajn fiŝojn. Post kiam oni starigis tiujn 'moveblajn dokojn' por malŝarĝi ŝipojn, ni ĉiam povas fiŝi kaj la porfiŝada tempo de niaj ŝipoj multe longiĝis."

La nomita ŝiparo havas sian kuracejon, kiu sin ekipis per diversaj medikamentoj por kuraci malvarmumon, intestan kaj stomakan inflamon, marmalsanon, kontuzvundon kaj aliajn oftajn malsanojn. Ekde la printempo de 1972, kuracisto Kju Hongping de la Kompanio de Akvoproduktaĵoj de Vendeng-gubernio komencis fari kuracadon al



Surmara servoŝiparo provizas fiŝistojn per diversaj flankmanĝaĵoj.

la surmaraj fiŝistoj. En la printempa fiŝado de 1973, iu fiŝisto estis reatakita de artrito pro frosta blovado kaj kuŝiĝis tri tagojn. Informiĝinte pri tio D-ro Kju Hongping ĉiumatene kaj ĉiuvespere veturis al li per boato por flegi lin, tiel ke la fiŝisto rapide resaniĝis. Krome, Kju Hongping disdonis al ĉiu servoŝipo iom da ofteuzataj medikamentoj kun ekspliko de metodo, por ke oni povu kuraci malsanajn fiŝistojn. Tio estis tre bonvena al la fiŝistoj.

Por pli bone plenumi sian servon, la laboristoj kaj oficistoj de la servoŝipoj atente aŭskultis opiniojn de la fiŝistoj kaj senĉese plivastigis sian servon. Komence ili nur provizis la fiŝŝipojn per bezonataj objektoj kaj aĉetis freŝajn fiŝojn; poste, aŭskultante, ke multaj fiŝistoj devis alporti de sia hejmo iujn objektojn kaj ripari difektitajn partojn de ŝipoj kaj retojn, ili do komencis akcepti komisian servon kaj riparadon. Multaj laboristoj kaj oficistoj de la servoŝipoj estas kaj aĉetistoj kaj riparistoj. Iuvespere difektiĝis lagro en maŝino de fiŝŝipo de Ĝugia-brigado. Ĝuste en tiu tempo tri servoŝipoj ankrumis proksime. Kamaradoj sur la ŝipoj informiĝis pri tio kaj tuj venis al la fiŝŝipo, malmuntis la maŝinon, demetis la difektitan lagron, muntis al ĝi sian rezervan lagron. Tiu ŝipo denove funkciis post la riparo.

Respondeca kamarado de la kompanio diris al ni: "La fiŝprodukto prezentis al ni novan postulon, kaj ni devas fari nian servon pli bona, por ke la produktado disvolviĝu pli rapide."



Neŭro-kirurgo

Duan Guoŝeng

Kuracisto Duan Guoŝeng

NEURO-KIRURGIA fakestro Duan Guoŝeng de la Ĝenerala Hospitalo de la Ĉina Popola Liberiga Armeo antaŭe estis kirurgo. Kiam li laboris en kuraca taĉmento en la milito por rezisti kontraŭ usona agreso kaj helpi Koreion, li vidis, ke iuj vunditoj je la kapo ne povis esti ĝustatempe kuracitaj pro manko de sperto de operacio al la kuracistoj. La forta respondeco igis lin fari decidon studi neŭro-kirurgion. Li ricevis subtenon de la partia organizo. Por ke li rapide konu tian kirurgion, la organizo ofte sendis lin aliloken por fari kuran kuracadon al malfacilaj kazoj. Dank' al diligenta studado, praktikado kaj modesta lernado de eksterlandaj bonaj spertoj, lia kuraca tekniko iom post iom altiĝis.

En somero de 1955, Duan Guoŝeng kaj lia asistanto sukcesis en la unua operacio de tumoro en la tria cerba ventriklo. Poste li faris ankoraŭ multajn malfacilajn operaciojn de cerba tumoro, kaj en iuj sukcesis kaj en aliaj ne. Kaj ĉiufoje li serioze resumis la sperton. Ĝis nun, li jam faris 700-800 operaciojn de cerbaj tumoroj inkluzive de tiuj de tumoroj en multaj sekcioj interne de la kranio kaj tiuj de intramjela tumoro je alta cervika nivelo kaj aliaj malfacilegaj operacioj.


En septembro de 1971, iu juna laboristino suferis de intramjela tumoro je alta cervika nivelo. Ŝia tumoro estis en la centro de la cervika mjelo. La spina tubo kun diametro de 1.5 cm. deformiĝis pro la enesto de la tumoro kun diametro de 2 cm. La supra parto de cervika mjelo influas spiradon. Tial, operacio al ĝi estas tre danĝera, eĉ malgranda difektiĝo povas kaŭzi morton aŭ seriozan kripliĝon. Por sukcesigi la operacion, Duan Guoŝeng kaj aliaj kuracistoj ellaboris post fojrefoja studado kompletan kaj precizan operacian projekton, kaj ili faris la operacion pli zorgeme ol horloĝisto en riparado. Unue ili faris malgrandan tranĉon kaj poste zorgeman disigadon laŭ unu flanko de la tumoro per disigilo. Kiam ili trovis ke la tumoro estas pli longa ol la tranĉo, ili longigis la tranĉon ĝis la egala longeco de la tumoro. Post okhora operaciado, ili fine elprenis la tumoron. Nun, la laboristino jam sane laboris du jarojn en fabriko.

Duan Guoŝeng ne kontentiĝis je siaj akiritaj sukcesoj, kaj en lia cerbo jam aperis nova problemo, kiel eviti postsekvajn de operacio de cerba tumoro. Li rimarkis, ke post operacio iuj pacientoj suferintaj de cerba tumoro saviĝis, tamen ili havas nek konscion nek fortikan korpon kaj pro tio ili ne povas


fari kontribuon por la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado. Tial li sentis la devon de kuracistoj tre granda.

Foje, li faris operacion por komunumano suferanta de meninga tumoro. La tumoro estis pli granda ol pugno, kaj ĉirkaŭ ĝi dense interkruciĝis angioj. Estis malfacile en tia operacio eviti difekton de nerva kapablo kaj ne kaŭzi postsekvaĵon al malmulta sangado, kio karakterizas la operacion de meninga tumoro, minacas la vivon de paciento kaj estas la ĉefa kaŭzo de postsekvaĵo post tia operacio. Duan Guoŝeng kaj aliaj kuracistoj elmetis pli ol 20 rimedojn por preventi troan sangadon post kuna studado kun aliaj kuracistoj kaj fine sukcese detranĉis maloftan vaskulan tumoron. Post nelonge la paciento sane elhospitaliĝis.

Kompreneble, Duan Guoŝeng ne opinias ke postsekvaĵo de la operacio povas esti tute evitita, kaj oni devas fari konkretajn analizojn. Nun li kaj aliaj kuracistoj ankoraŭ pene esploras por trovi vojon por eviti postsekvaĵon.



Duan Guoŝeng (maldekstre) kulturis junajn kuracistojn.



PRODUKTI PLI MULTE DA BONAJ AGRIKULTURAJ MEDIKAMENTOJ

Rapida progreso de la industrio de agrikulturaj medikamentoj de nia lando levis la produktokvanton de 1972 ĝis duoblo de tiu de 1965. La produktokvanto de januaro ĝis aŭgusto de 1973 kreskis je 13.4% kompare kun tiu de la sama periodo de 1972. La specoj de agrikulturaj medikamentoj de la lando jam superis 120 kaj la specoj de ties krudaj materialoj superis 80.

Progreso de agrikulturo elmetis pli grandan postulon al la industrio de agrikulturaj medikamentoj. Lastatempe oni sukcesis fabriki kelkajn novajn insekticidojn kaj herbicidojn kun alta efiko kaj malmulta veneno por homoj. Iu el la insekticidoj estas de longdaŭra efiko por ekstermi rizborantojn, alia povas ekstermi kotonajn afidojn, triaj povas protekti tritikojn kaj rizojn de guberelino kaj velkiĝa malsano (*Pellicularia sasaki*) Pro-

duktiĝis rizkampa herbicido sekura kaj bonefika. Kaj krome estas ankaŭ alia herbicido kun abunda fonto de krudmaterialo kaj malalta produktokosto, uzebla por diversaj plantaĵoj.

Por plue disvolvi la produktadon de agrikulturaj medikamentoj, en septembro de 1973 oni okazigis en urbo Nantong de Giangsu-provinco la Tutlandan Kunvenon de Agrikulturaj Medikamentoj.

La Ŝigiaĝuang-a Fabriko de mikrobaj Insekticidoj sukcesis produkti insekticidon de Bacillus thuringiensis kiu estas sentoksa por homoj kaj brutoj.



Ĉiu atingo akirita de Duan Guoŝeng en operacio de cerba tumoro estis gajnita tra praktiko de sukcesoj kaj malsukcesoj.

Ni prenu lian kuracadon al pacientoj de anomalia de giganta cerba vaskulo kiel ekzemplon.

Foje, la hospitalo akceptis pacienton de anomalia de giganta cerba vaskulo. Laŭ konsilo en medicina literaturo, li faris operacion al la paciento per la metodo de muskola embolo kiel plenigilo kaj fine malsukcesis.

Poste, venis alia paciento de la sama kazo. Preninte la lecionon de la antaŭa kazo, li kaj aliaj kuracistoj plibonigis la operacion sed ankoraŭ ne atingis la atenditan rezulton.

Ambaŭ sukceso kaj malsukceso donas seriozan provon al homoj, kaj ankaŭ Duan Guoŝeng estis multe tuŝita de la sinsekvaj malsukcesoj. Tamen, li pensis neniom pri persona profito sed pri tio ke li ankoraŭ devas antaŭenmarŝi kontraŭ malfaciloj kaj nepre trovi metodon por kuraci tiun ĉi malsanon. Je tio aperis en lia cerbo la fame konata medikamento "606". Li pensis, ke tiu medikamento estis sukcese farita post 606 eksperimentoj. Multaj estis la malsukcesoj, tamen ĉiu el ili entenis faktoron de sukceso. Se la inventintoj forlasus la eksperi-

mentadon post malsukcesoj, ili ne povus fine akiri la sukceson. Tio montris, ke "de malsukceso devenas sukceso". Se oni ne timas malsukceson kaj lertas en "lernado el sperto de malsukceso", kiel Lenin instruis, ili povas gajni novan venkon.


Kiam la tria paciento de tia kazo estis portita en la hospitalon, li estis en sveno. Post diagnozo, oni trovis ke lia cerba angio en anomalia pozicio estis je 2-3-oblo pli granda ol la normala, kaj bulo da interkruciĝantaj angioj rompis la norman cirkuladon de sango kaj kaŭzis mankon de oksigeno en la cerbo, kio rekte minacis la vivon de la paciento.

Vidante ke tiu kazo estas pli kompleksa ol la antaŭaj, iuj timis ke la operacio malsukcesos.

Serioze resuminte la malsukcesan sperton de la antaŭaj du operacioj kaj laŭ la anomalieco de angio de la paciento, Duan Guoŝeng aplikis taŭgajn muskolajn pecojn kaj faris per ili kelkajn plenigojn. Dum la plenigado, li ankaŭ faris observadon por eviti difekton al aliaj angioj. Post la operacio, la paciento reakiris sian kapablon paroli kaj iri.

Kamarado Duan Guoŝeng havas valoregan spiriton, t.e. li ĉiam admonas sin esti modesta kaj singardema kaj ofte sin avertas per la popola diro "veturilo ofte renversiĝas sur konata vojo".

Duan Guoŝeng ekzamenas pacienton en malsanula ĉambro.



Intima Intervidiĝo

KIEL membroj de la Vizita Grupo de Novzelanda-Ĉina Asocio, novzelandaj geesperantistoj William Rolt kaj lia edzino vizitis Ĉinion en oktobro, 1973. Dum ilia vizitado en Pekino, okazis varma kaj intima intervidiĝo inter ili kaj laborantoj de la redakcio de EPĈ kaj pekinaj esperantistoj.

Geedzoj Rolt okupiĝis pri Esperanto jam dekojn da jaroj, kaj ilia vizito portis al la ĉinaj esperantistoj amikecon de la novzelandaj esperantistoj. Dum la amika interparolado, la geedzoj multe laŭdis la senĉesan disvolviĝon de la amika rilato inter la popoloj de ambaŭ landoj de post la starigo de diplomaciaj rilatoj inter Ĉinio

kaj Novzelando, kaj krome ili elmetis bonajn opiniojn por plibonigi la laboron de EPĈ. La ĉinaj esperantistoj diris al la gastoj, ke kvankam longa distanco troviĝas inter Ĉinio kaj Novzelando, tamen la amikeca ponto interligas la popolojn de ambaŭ landoj. Kaj ili esperis ke la gastoj transdonu ilian saluton al la novzelandaj geesperantistoj post la reveno al sia patrujo.

S-ro Rolt estas agro-kemiisto de Novzelando. En la intervidiĝo li donacis al la ĉinaj amikoj sian verkon *El la Polvo de la Tero* en Esperanto. Ankaŭ la ĉinaj amikoj donacis memoraĵojn al la gastoj.

Tiu popola diro kun simpla filozofia vero estas resumita de homoj el praktikado. Kiam oni unuafoje faras iun laboron, ili sentas necertecon en si pro nekono de la reganta leĝo, kaj ili ĉiam estas relative seriozaj kaj singardemaj. Poste, kiam ili havas sperton, iuj el ili fariĝas malpli modestaj. Sekve de tio, sekura loko fariĝas malsekura kaj certa afero fariĝas malcerta.

Foje, ili diskutis pri la operacio de pituitaria tumor. Iuj opiniis ke ili jam havas sperton de operacio al tia tumor kaj povas facile ĝin plenumi. Aliaj opiniis, ke la x-radia filmo montras ke la tumor estas iom eksterordinara kaj estos malfacile plenumi la operacion. Duan Guoŝeng rimarkis ke tiu ĉi tumor vaste etendiĝis kaj ne similas al aliaj. Li diris: "Kvankam ni havas iom da sperto post multaj operacioj pri tiaj tumoroj, tamen ni neniel devas rigardi la akiritan sperton ĉiam aplikebla, sed devas vidi la apartecon de tiu ĉi kazo. Ĝuste la apartaĵo estas la nova konenda afero por ni. Tial, ĉiu operacio estas nova starto, kaj ni devas fari la centan aŭ milan operacion kun singardemo kaj seriozeco same kiel la unuan." Poste li kaj aliaj kuracistoj studadis la favorajn kondiĉojn kaj eventualajn malfacilojn de la operacio kaj serioze

faris preparojn. Vere apartaĵo aperis en la operaciado: La tumor de la paciento estis ne nur pli granda ol la ordinara, sed ankaŭ kreskis posten, kaj fibraj nervoj baris la vojon de la operacio. Dank' al multaj aliaj preparoj, ili tuj komencis de alia direkto kaj sukcesigis la operacion.

Duan Guoŝeng ofte diras: "Preferu pretigi cent rimedojn al la operacio, ol malsukcesi pro manko de unu necesa rimedo." Ĝuste per tiu alta respondeco al la revolucia afero kaj scienca sinteno, li senĉese antaŭenmarŝas.

Pro sia atingo en esplorado pri la sekreto de homaj kranio kaj cerbo, kamarado Duan Guoŝeng ricevis laŭdon. Tamen, li ne estas katenita de sukcesoj, sed kiel sportisto de stafetkuro ĉiam startas ĉe nova startlinio. Li diris: Kvankam mi laboris kiel kuracisto jam pli ol 30 jarojn, faris multajn kranio-cerbajn operaciojn kaj havas iom da sperto pri tio, tamen mi ankoraŭ ne konas multajn aliajn kazojn kaj ne povas fari multajn operaciojn pro la limigiteco de mia praktikado. Mi devas pli serioze studi Marksismon-Leninismon-Maŭzedongpenson, memkonscie reformi mian mondkoncepton kaj kontribui forton por la medicina afero de la patrujo.

Vizito al Belartaj

Ekspozicioj en Pekino

LA Tutlanda Ekspozicio de Rakontaj Bildserioj kaj Ĉinstilaj Pentraĵoj kaj la Ekspozicio de Kamparanaj Pentraĵoj de Huhian-gubernio aranĝitaj de la Ĉina Belarta Domo altiris al si milojn kaj milojn da rigardantoj.

RIĈA RIKOLTO

La tri okcidentaj haloj de la Belarta Domo prezentis ĝojindan scenon de riĉa rikolto en kreado de rakontaj bildserioj al la rigardantoj. La ekspozitaj 97 rakontaj bildserioj estas elektitaj el la granda kvanto da verkoj kreitaj de post la komenco de la kultura revolucio.

Ĝojiga afero montrita de la ekspozicio estas, ke senprecedence grandiĝis la trupo de kreantoj de rakontaj bildserioj, inter kiuj troviĝas ne nur profesiaj belartistoj, sed ankaŭ laboristoj, kamparanoj, ĈPLA-anoj, instruistoj, poetoj kaj verkistoj. Tio, ke la vastaj laborantaj popolamasoj partoprenis en la kreado de rakontaj bildserioj, alportis novan vivenerĝion al tiu arto.

Aperis multaj novuloj en la trupo de kreantoj de rakontaj bildserioj kaj ankaŭ la verkoj tre abundas. La ekspozitaj verkoj alprenis variajn formojn de guaŝo, akvarelo, krokizo, nigrainkaĵo, lignogravuraĵo kaj papertranĉaĵo, krom vasta apliko de nigraliniaj aŭ nigrablankaj pentraĵoj.

La novaj pentristoj de la nova trupo prenis por sia arta kreado novajn temojn kaj novajn heroojn.


Verkoj pri aktualaj bataloj kiaj *Heroaj Laboristoj de Daking* kaj *La Vojo de Daĝaj* okupas tre grandan procenton. La verkoj *Fajrero de Juneco* kiu prezentas bataladon de intelektaj gejunuloj kontraŭ klasaj malamikoj, *Markonka Pramejo* kiu laŭdas ruĝajn gvardianojn ĉe la Orienta Ĉina Maro kiuj transportis onklojn de ĈPLA malgraŭ ondegoj,

kaj *Rakonto pri Hiŝuangbanna*, kiu priskribas la varman zorgon de lokaj partiaj organizoj kaj registaroj, ĈPLA kaj amasoj al intelektaj gejunuloj, havas klaran temon, intensan vivetoson kaj delikatan figurigon, kaj multe interesis la rigardantojn.

Ankaŭ verkoj temantaj pri revolucia historio altiris atenton de vizitantoj. *Kanto de la Proletaro* kiu revidigas revolucionan aktivadon de la poeto de Pariza Komunumo Eugene Pottier, *Norman Bethune en Ĉinio* kiu prikantas la internaciisman batalanton Bethune kaj *Surakva Komunika Stacio* kiu priskribas kiel la komunika stacio en regiono okupata de malamikoj sekrete kondukas kadron de la Partio, estas rimarkindaj pro siaj seriozeco en kreado kaj lakoneco en komponado kaj pentrado. Aparte ĝojinde estas, ke aperis tiel bona verko kiel *Lusin* — *Granda Revoluĉiisto, Pensulo kaj Literaturisto*. Per seriozaj kaj pripensitaj strekoj kaj dece variaj tonoj tiu ĉi guaŝa bildserio prezentas al ni la grandan vivon de Sinjoro Lusin. Iu el la bildoj portas nin al Kantono en 1927, kie Lusin indigne leviĝis por riproĉi la demonojn en Sunjatsen-Universitato; alia montras al ni kiel firme Sinjoro Lusin staris kiel giganto senŝanceliĝe en Ŝanhajo en la tridekaj jaroj kaj senindulge kondamnis la malamikojn sur la literatura fronto; tria pripentras Lusin diligente studantan en lamplumo Marksismon-Leninismon; kvara vidigas al ni, ke Sinjoro Lusin verkas telegramon al Jan-an ĉe skribtablo por plene montri sian respekton al Prezidanto Maŭ kaj la Komunista Partio de Ĉinio. . . Tiu ĉi bildserio vivece prezentas al ni la noblan karakteron de Lusin, kiu plene sin dediĉis al la revolucio ĝis la lasta spiro.

KREO DE NOVO

En la ronda halo kaj la du orientaj haloj de la Ĉina Belarta Domo ekspozitiĝis 168 ĉinstilaj pentraĵoj.



Jan-an-aj Popolanoj Fidelas al Prezidanto Maŭ

Ĉinstila pentraĵo de la Ŝenhi-a Krea Grupo

Post longa praktikado en multaj historiaj periodoj, la ĉinstila pentrarto jam formis siajn originalan artan stilon kaj pentran teknikon. Hodiaŭ laborantoj de belarto provkreas novaĵon de proletaro en tiu ĉi antikva arto kaj servas per ĝi al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj.

La novaĵoj devas esti novaj antaŭ ĉio en la enhavo, en la esprimataj sentimentoj.

Starante antaŭ la pentraĵoj *Jan-an-aj Popolanoj Fidelas al Prezidanto Maŭ* la rigardantoj forte kortsuĝas. Rigardante en la pentraĵo, ke Prezidanto Maŭ afable kaj kore interparolas kun kamparanoj el Jan-an, la rigardantoj kvazaŭ aŭdus ilian sonoritan

raportadon al Prezidanto Maŭ kaj kvazaŭ ankaŭ ili feliĉe aŭskultus kune kun ili instruadon de la gvidanto. La pentraĵo *Prezidanto Maŭ Redaktas la Semajnan Gazeton "Politiko"* kondukas nin al la eventoplena revolucia periodo, en kiu Prezidanto Maŭ per flamaj vortoj malkaŝis la intrigon de la kuomintangaj reakciuloj celantan strangoli la revolucion kaj kondamnis la oportunistan linion de Ĉen Duhui.

Post la venka finiĝo de la Dekaj Kongreso de la Partio, multaj verkistoj skribis pri tiu ĝojiga afero. *Aŭroro Brilas super Huangpu-rivero* kaj aliaj estas novaj verkoj pri la varma akklamado de la tutlanda



Por Daking-aj Laboristoj Ne Estas Vintro

Senĉesa Hakado de Monto
Ĉinstila pentraĵo de Vang
Jingcun (virino) kaj Jang Liĝou

popolo al la venko de la Deko Kongreso. Inter la ekspozitaj pentraĵoj sin trovis ankaŭ verkoj kantantaj pri sana kreskado de novaĵoj. La kampara kadro en la pentraĵo *Lernado*, kiu absorbitas studas marksismajn-leninismajn verkojn sur la vojo de daŭra revolucio, estas miniaturo de vastaj amasoj de kadroj. La pentraĵoj *Pinoj sur Ĉangbajmontaro*, *Petskribo por Aliĝo al la Partio* kaj *En Kongreso de la Junulara Ligo* prezentas al ni la aspirplenajn trajtojn de la intelektaj junuloj sane kreskantaj en la vasta kamparo. *Voĉo de la Patrolando* verkita de tajvan-a pentristo spegulas la fortan volon de nia tuta popolo por liberigi Tajvan kaj reunigi la patruon.

Multaj verkoj pri laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj prezentas novan nivelon de arto. La verkoj *Por Daking-aj Laboristoj Ne Estas Vintro*, *Ĝojiga Torento de Petrolo* k.a. vivece prezentas heroojn de la ĉina laboristaro. Verkoj pri nia kamparo, kiel *Senĉesa Hakado de Monto* kaj *Hodiaŭ la Tero kaj la Ĉielo Estas sub Nia Kontrolo*, klopodas

prezenti la spiritan mondon de la novaj kamparanoj de la popola komunumo penantaj por fari kontribuon al socialismo, kaj klopodas prezenti prosperigon de nia kamparo. La pentraĵo *Kapti Malamikon Surĉevale* pri armea vivo energie modlis bravan soldaton en neĝblovo. La verko *Popolaj Pomoj* prikantas la bonan disciplinon de la popola armeo, kiu neniam atencas la intereson de la popolo.

Ankaŭ verkintoj de pentraĵoj pri la superba patrolando montris novon en la esprimataj sentoj kaj interesoj. *Facila Vojo trans Natura Tranĉeo* prezentas la novan fizionomion de la transportita Jangzi-rivero kaj *Bela Heroldo de Printempo* laŭdas per belega umefloro kiel simbolo la ardan entuziasmon de nia popolo.

En tiu ĉi ekspozicio oni povas vidi, ke iuj verkintoj akiris novan sperton en heredado kaj disvolvado de la tradiciaj teknikoj kaj samtempe ankaŭ asimilis



Ĉinstila pentraĵo de **Gaŭ Ĝitian**

eksterlandajn artajn teknikojn. La verkinto de la pentraĵo *Ekzercado* delikate prezentas ŝpinistinon kiu ekzercadas sin en profunda nokto pri nodado per la tradicia tekniko de apliko de delikataj strekoj kaj fortaj koloroj. La komponado karakteriziĝas per lakoneco dum la pripentro estas delikata. La verkinto de *Ekflugo de Aglidoj* aplikis samtempe la tradician pentroteknikon de uzo de paliĝantaj strekoj de nigraĵa koloro por kaj eksterlandan plastikan teknikon por prezenti grupon da infanoj sin ekzercantaj frumatene en luktarto por defendi la patruŝlandon, kaj la serena pentraĵo kun klaraj nuancoj relative bone prezentas la vivecplenan novan generacion.

LA MASTROJ

Post rigardo de la Tutlanda Ekspozicio de Rakontaj Bildserioj kaj Ĉinstilaj Pentraĵoj mi ascendis la duan etaĝon por viziti la Ekspozicion de Kampanaj Pentraĵoj de Huhian-gubernio. Irante en la aliaspektan ekspozician halon kaj rigardante la 179 pentraĵojn de kampanoj de Huhian, vi kvazaŭ subite enpaŝus en tiun avangardan gubernion ĉe la piedo de Kinling-montaro en lernado de Daĝaj. Antaŭ viaj okuloj prezentiĝas tigro viglaj novaj kampanoj kaj ĉiam pli noviĝantaj vilaĝoj. (Legu koncernan artikolon en n-ro 4, 1973, EPĈ.)



Lusin — Granda Revoluciisto, Pensulo kaj Literaturisto (*unu peco el la rakonta bildserio*)


Bela Heroldo de Printempo

Ĉinstila pentraĵo de **Guan Ŝan-jue**



Kampanaj pentraĵoj de Huhian-gubernio naskiĝis en 1958, la jaro de la granda antaŭensalto. En la pasintaj 15 jaroj, tiu arto de kampanoj disvolviĝis kaj hardiĝis en la revolucia ŝtormo kaj fariĝis pli kaj pli riĉa je batala spirito kaj amaseco. Tio plene pruvis, ke la vastaj amasoj de nia lando fariĝas mastroj de la socialisma kulturo sub la gvido de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ.

Kampanaj pentristoj de Huhian diris, ke ili volas "pentri la realon kaj pentri sian idealon". Ekzemple en la pentraĵo *Fosado de Puto*, la verkinto pentris ne nur la komunumanojn sur la tero, sed ankaŭ tiujn profunde en la puto, de supra vidpunkto, por bone esprimi ilian heroan klopodon. *Fislageto de Komunumo* per diversaj fiŝoj grandaj kaj grasaj bombaste kaj realisme montras la prosperan disvolviĝon de la diversaj entreprenoj de la komunumo. En multaj el iliaj verkoj, kiel *Ŝafpaŝtado*, *Ora Monto kaj Arĝenta Maro* kaj *Riĉa Rikolto de Kapsiko*, oni aplikis tiun esprimmanieron de revolucia romantismo ĉie kun aparta sukceso. Aparte notinde estas la multe laŭdata pentraĵo *Maljuna Sekretario*, kiu bone prezentas jenan tipan figuron: en laborpaŭzo maljuna sekretario denove elprenis la ĉinlingvan tradukaĵon de *Anti-Duhring* plejparte jam legitan kaj serioze ĝin studas plue. Li studas tiel absorbite, kvazaŭ li jam forgesus bruligi la tabakon en la pipo tenata en sia buŝo. Estas ne hazarde, ke Liu Ĝide kreis tiun pentraĵon. Li mem estas sekretario de brigada partia filio kaj bone konas la vivon kaj penson de la heroo en la pentraĵo. Por sukcesigi sian verkon, li faris multajn krokizojn pri samtipaj modeloj. La ekspozitaj eminentaj verkoj montras, ke la pentrado de kampanoj de Huhian-gubernio estas ne nur vaste popularigata, sed ankaŭ senĉese altigata en arto.



Ekflugo de Aglidoj

Ĉinstila pentraĵo de Oŭ Jang (virino)

Kapti Malamikon Surĉevale

Ĉinstila pentraĵo de Li Huj



Bambuaj Lancoj

(Poemo)

Sur la ŝose' numero dektri
nun la kanonoj de l' Armeo Liberiga ĉesis brui,
kaj borde de Mekongo
la flagraj tendarfajroj ĉesis bruli;
mi vidis ke gerilanino
eliras el ĝangalmedio
kun florburĝono de printempo frua
ĉe la tempo;
per siaj manoj
poluras ŝi l' armilojn karajn
— bambuajn lancojn akrajn
unu, du. . . kiuj teruregis malamikojn,
kaj nune gajnis venkon la batalan.

Ĉi-hore l' bambulancoj
brilegas en la ora suno,
verŝajne l' hieraŭaj flamoj
dancadas eĉ en nuno. . .

En kiom da jaroj
kaj ŝtormveteroj,
maljuna paĉjo vivoplene
tranĉadis bambulancojn por la celo
ĝis elĉerpiĝ' de lampoleo kaj apero de la steloj;
kiom da fratoj
kaj fratinoj,
antaŭ l' unua kokeriko,
formarŝis kun ili por batali
kuraĝe kontraŭ l' malamiko!

Ho, bambulancoj,
kiom da kantoj kaj legendoj
vi verkis
en la senfinaj tagoj kaj nokthoroj fumtorentaj. . .


Susuraj la folioj de bambuoj
fortikaj kaj obstinaj akregas en spadformo,
ĉar ili hardis sin en pulvofumoj

kaj furioz' de ŝtormo.
Indigne staras la bambuoj feraj,
ĉar ili kreskas inter la maldolĉaj herboj
ensorbante sangon de la tero,
pro tio ili estas rektaj, neflekseblaj.
De kiom da ŝtormplenaj jaroj ili staris
en vent- kaj pluv-tumulto
akompanante l' batalantojn
sin firme apogante al ilia ŝultro!
La batalanto kaj la bambulanco,
la bambulanco kaj la batalanto,
kiom intima frata alianco!

Jen kiel dignoplena
ĝi staras sur posteno
kun alta singardemo,
ĝi gardas ĉielarkon post tempesto,
la novajn domojn kun ankoraŭ nelakitaj pordoj kaj
fenestroj,
ŝvebantajn kuirfumojn kaj lamplumojn brilajn,
incendio ardajn konstruejojn,
la rizkampanan maron kaj la maron rizkamposimilan,
la mandarinan dolĉon kaj la palmsmeraldon,
kaj ĉiujn siajn meritatajn rajtojn. . .
Ho, bambulanc' hardita en la fajr' kaj sango,
fleksig'os vi neniam, rompiĝ'os vi prefere,
neniu forto en la mondo
ja povas vin superi!

Heroa bambulanco,
similas vi al gravuril' por memorŝtono,
al plum' por epopea verk-bezono.
Hodiaŭ verkis mi la kanton al vi
ĝuste por kanti la heroan vjetnaman popolon,
ĝi estas ja saluto
de liberiga batalado
al la popol' revolucia de la mondo!

Enteriga ceremonio de la cindro de S-ro Edgar Snow



Enterigo de Cindro de S-ro

Edgar Snow en Pekino

CEREMONIO de la enterigo de la cindro de S-ro Edgar Snow, amiko de la ĉina popolo kaj fama usona verkisto, estis okazigita en Pekino, je la 19-a de oktobro, 1973.

La cindro de S-ro Edgar Snow estis enterigita ĉe la bordo de la bela Vejming-lago en la Pekina Universitato. Ĉirkaŭ la tombo, kreskas pinoj kaj cipresoj en smeralda verdo. La blanka marmora tomboŝtono portas la jenajn vortojn en la ĉina kaj angla lingvoj: "Tombo de Edgar Snow, usona amiko de la ĉina popolo". Metita en la fronto de la tombo estis girlando prezentita de la granda instruanto de la ĉina popolo Prezidanto Maŭ kun la surskribo: "Al S-ro Edgar Snow". Girlandoj estis prezentitaj ankaŭ de Song Kingling, vicprezidanto de la Ĉina Popola Respubliko; Gu De, prezidanto de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso; Ĝoŭ Enlaj, ĉefministro de la

Ŝtata Konsilantaro; Giang King, membro de la Politika Buroo de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio; kaj de koncernaj departementoj kaj geamikoj de la mortinta S-ro Edgar Snow. Tie troviĝis ankaŭ girlandoj prezentitaj de la edzino, infanoj kaj parencoj de S-ro Snow.

La ceremonion ĉeestis la ĉinaj gvidantoj kaj respondeculoj de koncernaj departementoj Ĝoŭ Enlaj, Li Fuĉun, Guo Moĵuo, Deng Jingĉaŭ, Liaŭ Ĉengĝi, Kang Keking, Liu Hiangping kaj Ding Guoju, kaj reprezentantoj de la instruistoj kaj studentoj de la Pekina Universitato.

Ĉeestis ankaŭ Lois Snow, edzino de la mortinta S-ro Edgar Snow, kaj ilia filino Sian Snow; Kashin Wheeler, plijuna fratino de S-ino Snow; Mary Heathcote, pentristo Douglas Gorsline kaj S-ino Marie Gorsline, geamikoj de la mortinta S-ro Snow.



S-ro Edgar Snow unufoje venis al Ĉinio en 1928. Dum sia restado en Pekino de 1933 ĝis 1938, li laboris kiel instruisto en Jenging-universitato kaj loĝis du jarojn en ĝia korto kie nun sidas la Pekina Universitato. En 1936 li vizitis la ĉinan revolucion bazlokon en norda Ŝenhi. Reveninte al Pekino li verkis la libron *Ruĝa Stelo super Ĉinio* en kiu li prezentis al la usona popolo kaj la popolo de la aliaj landoj de la mondo la ĉinan revolucionan batalon kaj la 12,500-kilometran Longan Marŝon de la Ĉina Laborista-Kampano Ruĝa Armeo sub la gvido de Prezidanto Maŭ. Post la fondiĝo de la nova Ĉinio en 1949, S-ro Snow vizitis Ĉinion trifoje en 1960, 1964 kaj 1970, kaj skribis multe da raportaĵoj pri la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado de la ĉina popolo. Dum la restado en Pekino en 1970, gesinjoroj Snow faris specialan viziton al la Pekina Universitato kaj promenis refoje ĉirkaŭ Vejming-lago. Poste, kiam S-ro Snow estis serioze malsana, li ankoraŭ sopiris al la ĉina popolo kaj testamentis ke li amas la novan Ĉinion kaj deziras ke parto de li restu en Ĉinio post lia morto. Laŭ lia deziro, S-ino Snow portis parton de lia cindro al Ĉinio.

La enteriga ceremonio estis prezidita de kamaradino Deng Jingĉaŭ. Kamarado Liaŭ Ĉengĝi kaj S-ino Snow faris paroladojn en ĝi.

En sia parolado, Liaŭ Ĉengĝi diris: “Por esprimi la deziron de S-ro Snow, S-ino Snow kaj la funebranta familio portis lian cindron al Ĉinio por enterigo. Tio estas manifesto de konfido kaj amikeco al la ĉina popolo, kion ni tre alte taksas kaj ni estas profunde kortuŝitaj.”

“S-ro Edgar Snow estis malnova amiko de la ĉina popolo,” li daŭrigis, “por pluraj jardekoj, ĉu en la penigaj jaroj de la ĉina revolucio aŭ en la jaroj post la fondiĝo de la nova Ĉinio, li konstante faris senĉesan klopodon kaj gravajn kontribuojn por akcelo de reciproka kompreno kaj amikeco inter la ĉina kaj usona popoloj. Lia vivo servis kiel atesto pri la vera amikeco inter la ĉina kaj usona popoloj.”

Liaŭ Ĉengĝi diris: “En la pli ol unu jaro post la forpaso de Edgar Snow, la rilatoj inter Ĉinio kaj Usono iom pliboniĝis, kaj la amikeco inter ambaŭ niaj popoloj certe kontinue disvolviĝos.

“La memoro de nia kara amiko Edgar Snow vivos por ĉiam en la koro de la ĉina popolo!”

En sia parolado S-ino Lois Snow diris: “Mi parolas por multaj homoj — por miaj infanoj, Christopher kaj Sian, por la familio de mia edzo, por mia propra familio, por ĉieaj geamikoj, kaj por mi mem kun la profundaj simpatioj de edzino — kiam mi dankas la ĉinan popolon kaj la gvidantojn de la ĉina popolo pro tiu ĉi honoro donita al mia edzo kaj pro tiu ĉi profunda manifesto de internacia amikeco kiu ligas nin ĉiujn.”

S-ino Snow diris plue: “En siaj testamentitaj vortoj mia edzo esprimis sian amon al Ĉinio kaj sian deziron ke parto de li restu ĉi tie post la morto kiel ĝi ĉiam estis dum la vivado. Ni metas tiun parton de li nun en la antikvan grundon de nova Ĉinio, inter la novajn homojn de Ĉinio, kie respekto al la homaro atingis novan altecon kaj kie espero por la mondo disradias per nova brilo.”

En la ceremonio partoprenis ankaŭ fremdlandaj geamikoj en Pekino.



Vizito al Novzelando, la Insula Lando en Oceanio

La Ĉina Amika Vizita Grupo vizitis Novzelandon en julio de 1973. La entuziasma kaj amika akcepto de la gastiganta lando restigis al la vizitantoj freŝan memoron.

Profesoro James Bertram de Victoria-universitato de Velingtono, la ĉefurbo de Novzelando, speciale venis al la aerodromo por bonvenigi la

gastojn. En 1937, kiel brita ĵurnalisto Prof. J. Bertram vizitis Jan-an kaj tie Prezidanto Maŭ Zedong akceptis lin. La interparolo dum ilia intervidiĝo estas registrita en la artikolo "Interparolo kun la Brita Ĵurnalisto James Bertram" en la dua volumo de *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*. En 1957 li refoje vizitis Ĉinion laŭ invito. Kaj li sentis apartan intimecon vidante la ĉinajn amikojn en Velingtono.

Sinjorino Hinrangi Deller, plenuma membro de la Aŭklanda Filio de la Novzelanda-Ĉina Asocio faris viziton al Ĉinio en 1964 gvidante la Maorian Kulturen Grupon de Waitomo. Ĉifoje ŝi ĉiam akompanis la ĉinan vizitan grupon en ĝia vizitado al la Norda Insulo. Kiam la vizita grupo atingis ŝian hejmlokon Waitomo, la membroj de la kultura grupo venis de malproksimaj lokoj por bonvenigi la ĉinajn amikojn. Ili interbabilis pri la amikeco kaj senĝene kantadis. La emocia sceno lasis neforgeseblan impreson al la vizita grupo.

En Aŭklando emerita konstruisto Bernard Chelsea varme akceptis la ĉinan grupon. Li vizitis

Novzelandaj popolanoj bonvenigas ĉinajn amikojn kun rubando portanta la surskribon "Vivu la granda unuiĝo de la tutmonda popolo".



Ĉinion en la kultura revolucio. Ĉifoje li invitis la tutan grupon al lia hejmo. En lia domo pendas ĉina palaca lanterno kaj gramofono sonigas ĉinajn kantojn. La varma saluto kaj amika interbabilado ŝajnis al la ĉinaj vizitantoj, ke ili sidus en sia propra hejmo. La profunda amikeco inter la popoloj de Novzelando kaj Ĉinio multe emociis la vizitan grupon.

Dunedin estas urbo loĝata unue de skotoj. La gastigantoj bonvenigis la ĉinan vizitan grupon per tradicia skota ceremonio. Evans, prezidanto de la Dunedina Filio de la Novzelanda-Ĉina Asocio, retrorigardis la amikecon inter la popoloj de ambaŭ landoj, dirante: “Antaŭ 15 jaroj ni starigis la filion de la Novzelanda-Ĉina Asocio en Dunedin kaj la filio ĉiam celas starigon de la amika rilato inter Novzelando kaj Ĉinio. Via vizito kontentigis nian deziron akcepti gastojn el Ĉinio.”

La ĉinaj gastoj vizitis 9 urbojn de Novzelando. En adiaŭo novzelandaj amikoj esprimis, ke ilia proverbo diras: “Oni ŝanĝu ĉiujn ŝtonojn en juvelojn por konstrui amikan ponton en la vasta oceano”. La amikeco inter la popoloj de Novzelando kaj Ĉinio estos ĉiam verda kiel pinoj kaj cipresoj.

Floroj de Amikeco

En la Parko de Centra Strato de la urbo Sapporo, Hokajdo, Japanio, troviĝas nova skvaro kun plene florantaj floroj. Sur alumina indiktabulo staranta apud la skvaro estas delikataj desegnoj de zinio, ĉina astero kaj tri aliaj belaj floroj. La tabulo eksplikas, ke la floroj estas elkulturitaj per semoj donacitaj de la ĉina elementa lernejo Ĉangŝan al la elementa lernejo Macuŝiro de la urbeto Macumae de Hokajdo de Japanio.

La afero okazis en 1972. Kiam la instruistoj kaj lernantoj de la elementa lernejo Ĉangŝan de Hianfeng-komunumo de Ji-an-gubernio, Hejlong-giang-provinco, Ĉinio informiĝis, ke la instruistoj kaj lernantoj de la japana elementa lernejo Macuŝiro donacis al ĉinaj knaboj sakurajn arbidojn, ili skribis al la lernejo Macuŝiro, ke ili intencis donaci al ĝiaj japanaj knaboj ĉinajn florsemojn por esprimi la amikecon inter la ĉina kaj japana popoloj. En februaro de 1973, Sinjoro Asari de la lernejo Macuŝiro respondis: “. . . Kun granda ĝojo mi akceptos la florsemojn venontajn de la ĉina popolo. Ni kulturos ilin kaj disdonos iliajn ĝermojn al pli multaj

japanoj por ke la floroj de amikeco floru ĉie tra la japana tero . . .”

La 27-an de marto la ĉinaj florsemoj estis alportitaj de aeroplano de la Tutjapana Kompanio de Aerovojo al Hakodate-aerodromo de Hokajdo. Sinjoro Asari kaj 4 lernantoj speciale rapidis al Hakodate kaj reportis la semojn al la lernejo. En la sekvanta tago Sinjoro Asari kaj lernantoj sub lia gvido semis la semojn en la forcejo de Ĝardeno de Sakuraj Specimenoj proksime de la lernejo.

Dank’ al la zorgema flegado de la japanaj amikoj, la semoj ĝermis unu post alia manifestante sian vivforton.

Kiam ĉiuj semoj ĝermis, la instruistoj kaj lernantoj de la lernejo Macuŝiro transplantis la plantidojn en la lernejan skvaron laŭ la antaŭplanitaj desegnoj “Amikiĝu Japanio kaj Ĉinio” kaj “Floroj de Amikeco”. Ankaŭ en skvarojn de la 20 grupoj de la lernejo oni transplantis tiajn plantidojn. La japanaj amiketoj tre amis la ĝermojn kaj ofte ilin sterkis, akvis kaj sarkis herbaĉojn . . . En la meza tagdeko de junio la floroj ekfloris unu post alia en ĉiuj skvaroj.

La instruistoj kaj lernantoj ne nur donacis la ĝermojn al proksimaj lernejoj, sed ankaŭ proponis transplanti la amikecajn florojn en parkon de Sapporo, la plej granda urbo de Hokajdo. Ilia propono estis varme aprobita de la urba registaro kaj koncernaj departementoj de Sapporo. Oni speciale konstruis novan skvaron en la Parko de Centra Strato por planti en ĝi ĉinajn florojn.

Sinjoro Asari diris al ĉinaj amikoj: “La infanoj propramane kulturis la florojn de amikeco kaj estis profunde impresitaj de tio post sarkado, akvado k.a. laboroj. La amikecaj semoj dissemigitaj en iliaj koroj certe donos senvelkajn florojn de amikeco inter Japanio kaj Ĉinio.”

Amikeca Melodio de Surnao

En somerfino kaj aŭtunkomenco de 1973 la Ŝanhaja Akrobata Trupo de Ĉinio faris viziton al Turkio laŭ ĝia invito kaj tie ricevis varman kaj amikan akcepton de la turka popolo.

Iun vesperon, en la granda halo de iu hotelo apud la maro Marmara, la artistoj de la Turka Popola Kantodanca Ensemblo kaj la ĉinaj akroba-



Laŭ la antikva nacia moro, turkaj amikoj buĉis ŝafon por esprimi sian deziron, ke la ĉinaj gastoj sukcesu en sia prezentado kaj estu feliĉaj.

toj kune sin amuzis kaj pasigis tie neforgeseblan nokton.

Sub la gaja akompano de surnao kaj tamburino, 5 turkaj aktoroj prezentis popolan dancon devenintan de la antikva “silka vojo”. Ili dancis kaj kantis brakon en brako. La popola danco kun forta orienta koloro tre intime impresis la ĉinajn artistojn. En varma aplaŭdo iu turka ludisto de surnao prezentis pecon de turka popola melodio. Tuj post lia ludo iu surna-ludisto de la Ĉina Akrobata Trupo tostis al li kaj ekludis per surnao la ĉinan popolan melodion *Cent Birdoj Omaĝe al Fenikso*.

Surnao, malgranda orienta muzikilo, estas atestanto pri la longa historio de la amikeco inter la ĉina kaj turka popoloj. En antikveco la fama “silka vojo” interligis Ĉinion kaj Turkion kaj akcelis la interŝanĝon de kulturo kaj varoj de Ĉinio kun Turkio kaj aliaj landoj laŭlonge de la vojo. Oni diris, ke surnao devenis de Turkio en Ĉinion en la antikveco. Ĝis nun ĝi ankoraŭ estas tradicia muzikilo ŝatata de la ĉina kaj turka popoloj. Ĝia formo, ludarto kaj eĉ la prononco de ĝia nomo “surnao” estas samaj en ambaŭ landoj. Ankaŭ strukturo kaj ludarto de aliaj muzikiloj flaĝoleto,

dombro, tamburino estas samaj en ambaŭ landoj. Iu turka amiko pensplene diris: “Deantikve la popoloj de niaj ambaŭ landoj estas amikoj frekventantaj unu la alian. Hodiaŭ ni aprezas vian ludon kun tia sento, ke ni renkontiĝas kun malnovaj amikoj kaj parencoj.”

Pli kaj pli gaja atmosfero regis la amikan amuzadon. La mastroj kaj gastoj interverŝis sian koron ĉe tabloj. Ankaŭ ĉinaj aktoroj prezentis prestidigitajojn kaj muzikaĵojn multe aplaŭdatajn de la ĉeestantoj. Turka aktorino emocie iris antaŭ mikrofonon kaj diris: “Mi diras en la nomo de nia ensemblo, ke hodiaŭ vespere ni sentas eksterordinaran feliĉon!” Vicprezidanto de la Asocio de Turkaj Sportaj Ĵurnalistoj ĝoje diris: “Mi firme kredas, ke la amikeco inter la turka kaj ĉina popoloj certe estos bela en la estonteco same kiel en la hodiaŭa vespero.” En lia propono la aktoroj de ambaŭ landoj ekdancis turkan popolan dancon manon en mano.


Ekster la halo senĉese fluas akvo tra la markolo kaj en la halo laŭtas amikecaj kantoj. Jam estis la frua mateno de la sekvanta tago, sed la aktoroj de ambaŭ landoj ankoraŭ ne volis disiĝi.

Amikaj Aktivadoj

VARMAJ LAŬDOJ AL LA RUMANAJ VOLEJBALAJ TEAMOJ

En septembro de 1973, la rumanaj vira kaj virina volejbalaj teamoj faris amikecan konkurs-viziton en Ĉinio. La vira teamo havas riĉajn spertojn de internacia konkursado kaj lertas en forta atako. Ĝia ludarto donis profundan impreson al la ĉinaj rigardantoj. La virina teamo estas juna, kiu kun firma batalvolo lertas en bona defendo kaj forta frapo. Ĝi ricevis varman manklakadon de la rigardantoj dum la konkursoj kun la ĉina virina volejbala teamo.

Japana gimnasto lerte ludas rekon.



PERFEKTA PREZENTADO DE LA ĈINAJ KAJ JAPANAJ GIMNASTOJ

En septembro de 1973, la japanaj gimnastikaj teamoj faris amikecan viziton al Ĉinio. La forta japana vira teamo multfoje gajnis brilajn sukcesojn en internaciaj konkursoj per malfacileco, noveco kaj ĝusteco de siaj movoj. Ankaŭ la japana virina teamo havis bonajn sukcesojn en internaciaj konkursoj. Dum sia vizito en Ĉinio ili faris prezenta-dojn kune kun ĉinaj gimnastoj, interŝanĝis teknikon kaj pliigis la amikecon.

VIGLECPLENA MEKSIKA AMATORA JUNULA FUTBALA TEAMO

Piedpilkado estas tre populara en Meksikio. En oktobro de la jaro 1973 la Meksika Amatora Junula Futbala Teamo vizitis Ĉinion laŭ invito. En Pekino ĝi havis amikecajn konkursojn kun la Futbala Teamo de la Pekina Fizikkultura Instituto kaj la Kombinita Teamo de Pekinaj Studentoj. La membroj de la gasta teamo estas tre junaj kun malpli ol 20 jaroj meznombro, tamen ili montris bonan ludarton en la konkurso kun la Kombinita Teamo de Pekinaj Studentoj.

KORBOPILKADO INTER LA ĈINA KAJ SUDANA TEAMOJ

En oktobro de 1973, la sudanaj vira kaj virina korbopilka teamoj veturis al Ĉinio por amikeca vizito. Dum la konkursado la ĉinaj spektantoj esprimis sian bonvenigon al la afrikaj amikoj per varmaj aplaŭdoj. En la matĉo kun la ĉina vira korbopilka teamo la junaj sudanaj sportistoj montris sian altan nivelon de rapida atako, kio ricevis varman manklakadon de la spektantoj.

LA KOREA VIRINA KORBOPILKA DELEGACIO “APROK-RIVERO” EN ĈINIO

En la periodo de oktobro ĝis novembro de la jaro 1973, la Virina Korbopilka Delegacio “Aprok-rivero” de la Ministerio de Publika Sekureco de la Korea Demokratia Popola Respubliko faris amikecan viziton al Ĉinio. Ĝi gajnis la ĉampionecon de virina korbopilka konkurso en la Kvara Korea Popola Sporta Kunveno en 1973. La meznombra aĝo de ĝiaj membroj estas 22 jaroj. En la konkurso kun la ĉina virina teamo ĝi montris altrapidecon en atako, trafan enĵeton de korbopilko en meza distanco kaj harmonian ludadon. Ĝiaj ludistinoj ofte akiris poentojn helpe de avanulo aŭ centrulo. La bona ludado de ambaŭlandaj sportistinoj rikoltis varman aplaŭdon de la rigardantoj.



Naturaj Riĉaĵoj de Ĉinio

ĈINIO havas vastan teritorion de 9,600,000 kvadrataj kilometroj kaj abundas je diversaj naturaj riĉaĵoj.


AGRARO

La nuna areo de kulturataj agroj en Ĉinio ampleksas 1,600 milionojn da muoj (15 muoj egalas al 1 hektaro), kiuj ĉefe koncentriĝas sur ebenaĵoj. Tiuj ebenaĵoj kun dika tertavolo kaj favora klimato

estas niaj ĉefaj agrikulturaj regionoj. El ili la plej grandaj estas jenaj tri:

La Nordorienta Ebenaĵo kuŝas inter la Granda kaj Malgranda Hing-an-montaroj kaj Ĉangbaj-montaro. Ĝia norda parto apartenas al fekunda regiono kun nigra grundo kaj estas unu el la gravaj grenproduktaj lokoj de nia lando. Tie oni kulturas unufoje en unu jaro plantaĵojn, kiel sorgon, printempan tritikon, sojon, milion kaj rizon.

Riĉan rikolton de rizo akiris la membroj de Kju-jangkiaŭ-komunumo sur la Nord-Ĉinia Ebenaĵo.




La Nord-Ĉinia Ebenaĵo estas formita el aluvioj de la Flava Rivero, Huajhe-rivero kaj Hajhe-rivero. Ĝi havas plej grandan areon de kulturataj agroj kaj ekspluatataj plej frue en Ĉinio. Tiu ebenaĵo, plejparte kun bruna grundo kaj malgrandparte kun salalkala grundo ĉe marbordaj kaj malaltaj lokoj, estas nia ĉefa produkto de vintra tritiko, maizo kaj sorgo, kaj krome tie abunde produktiĝas kotonno, arakido, tabako, sezamo kaj aliaj ekonomiaj plantaĵoj.

La aluvia Ebenaĵo de la Meza kaj Malsupra Jangzi-rivero sin etendas de Jiĉang en okcidento ĝis Ŝanhajo en oriento. Tie retas riveroj, multas lagoj kaj la naturo dotis la lokon per fekunda grundo kaj humida klimato. La regiono estas nia ĉefa rizproduktejo. Tie oni multe plantas ankaŭ tritikon, kotonon kaj kolzon, kaj bredas silkraŭpojn.

En Ĉinio troviĝas multaj internaj ebenaĵoj, nome la Fenvej-ebenaĵo (formita el la valoj de Fenhe-kaj Vejhe-rivero en la provincoj Ŝanhi kaj Ŝenhi), Ĉengdu-ebenaĵo okcidente en Siĉuan-baseno, Jinĉuan-ebenaĵo en la Ninghia-a Huj-nacia Aŭtonoma Regiono, la Riverkurbiĝa Ebenaĵo en la Interna Mongolio kaj oazoj en la Hingiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono kaj la okcidenta parto de Gansu-provinco. Kvankam tiuj ebenaĵoj posedas relative malgrandan areon, tamen havas fekundan grundon

La Huajbej-a Karboelekto



Jangzi-rivero, la plej granda rivero de Ĉinio kun longeco de 5,800 kilometroj, estas transporta aorto interne de Ĉinio. Jen ŝipoj trapasas la kanjonon Vuhia.

kaj bonajn irigaciajn sistemojn, tial ili estas gravaj produkto de greno kaj ekonomiaj plantaĵoj interne de la lando.

AKVO

Ĉinio havas multajn riverojn kun riĉa akvofonto.

Topografie Ĉinio dekliniĝas deokcidente orienten, tial la riveroj relative grandaj kaj longaj plejparte fluas deokcidente orienten en Pacifikon. La pluvokvanto estas abunda pro la senĉesa enfluo de vaporo el Pacifiko sub la intensa influo de somera musono. Krome la akvofonto estas riĉa kaj akvokvanto granda, ĉar la ĉefaj riveroj plejparte fontas el la altebenaĵoj kaj montaroj. Laŭ nekompleta statistiko, la jara totala fluokvanto de ĉiuj riveroj de Ĉinio estas pli ol 2,700,000 milionoj da kubmetroj, el kiuj tiu de Jangzi-rivero okupas 38.3%.

La akvoriĉaj riveroj torentas de altebenaĵoj kaj altaj montoj al ebenaĵoj kaj basenoj, kio formis

grandan falodistancon kaj grandan kvanton da energia fonto. La totala rezervokvanto de akva energio de Ĉinio estas 580 milionoj da kilovatoj. Post la Liberiĝo oni konstruis sur riveroj grandaj kaj malgrandaj tra la tuta Ĉinio milojn kaj milojn da diversaj akvobaraĵoj, kiuj ludas grandan rolon ne nur en kontraŭinundo, sed ankaŭ en produktado de elektro kaj disvolvo de irigacia afero. La ĉefaj riveroj provizis nin per favoraj kondiĉoj por komunikado kaj nun la naviga vojo longas 160,000 kilometrojn.

MINERALOJ

Ĉinio riĉas je mineraloj, kiuj dislokiĝas vaste. Ili estas multspecaj kaj havas grandan rezervokvanton. La rezervokvanto de ĉefaj mineraloj — karbo, fero, petrolo, kupro, aluminio, volframo, antimonio, molibdeno, stano, mangano, plumbo, zinko, hidrargo — sin trovas inter la frontaj vicoj en la mondo. Riĉan rezervon havas ankaŭ oleskisto, fosforo, magnezito, salo, gipsoŝtono ktp. Krome estas ankaŭ diversaj nemetalaj mineraloj, kiaj diamanto,

asbesto, glimo, grafito, kaolino, diabazo, perloŝtono, kristalo kaj kvarco. Krom Anŝan-ferminejo en Liaŭning-provinco, Daje-ferminejo en Hubej-provinco kaj Bajjun-ebo-ferminejo en la Interna Mongolio, dislokiĝas ankaŭ mezgrandaj kaj malgrandaj ferminejoj en ĉiuj provincoj. La ĉefaj karbobazoj de nia lando estas Datong en Ŝanhiprovinco, Kajluan en Hebej-provinco, Fuŝun kaj Fuhin en Liaŭning-provinco, Huajnan kaj Huajbej en Anhuj-provinco. Depost la kultura revolucio mezgrandaj kaj malgrandaj karbominejoj konstruiĝis en la provincoj sude de Jangzi-rivero, kio ŝanĝis la staton de transportado de karbo denorde suden. Petrolrezervo konserviĝas vaste tra la lando, kaj la famaj produktoj de petrolo estas Jumen de Gansu, Kelamaji de Hingiang kaj Daking.

ARBAROJ

Ĉinio estas lando kun multaj montoj. La altebenaĵoj kaj montoj konsistigas 60% el la totala areo de la tuta lando. Tie troviĝas vastaj arbaroj kaj stepoj.

Transportado de ligno en vintr



La arbaroj de nia lando koncentre kreskas en la Nordoriento, la Sudokcidento, kaj en Fugian-provinco kaj la orienta parto de Tajvan-provinco en la Sudoriento. Tiuj arbaroj sin formas el diversaj tipoj kaj multaj specoj. La alttrunkaj arboj sole nombriĝas je pli ol 2,800 specoj, el kiuj preskaŭ 1,000 portas relative grandan ekonomian valoron. Inter pinacoj staras la tajvan-a kriptometrio alta je 67 metroj, la tajvan-a falscipreso kun diametro de 6.5 metroj, metasekvojo, ĉina cipreso, bela orlariko kaj aliaj ĉinaj unikaj arboj raraj en la mondo. Krome tie kreskas multaj valoraj drogvegetaloj.

STEPOJ

La areo de stepoj de Ĉinio okupas iom pli ol kvinonon de la totala areo de la tuta lando. Pli ol duona areo de la Interna Mongolio estas stepoj, kaj vastaj stepoj troviĝas ankaŭ en Hingiang, Kinghaj kaj Tibeto. Tiuj stepoj servas kiel paŝtejoj riĉaj de multspecaj nutraj herboj kaj per tio liveras bonajn kondiĉojn por disvolvi brutobredon.

En Ĉinio vivas multaj bonrasaj brutoj. Sanheĉvalo uzata por jungado kaj rajdado estas fame konata en kaj ekster la lando. Poefago de Kinghaj-Tibeta Altebenaĵo estas unika brutoj de Ĉinio kun granda eltenemo kontraŭ frosto. La graso mongola ŝafo de la Interna Mongolio karakteriziĝas per sia 10-kilogramo vosto. La fajnolana ŝafo de Hingiang famiĝas per sia bonkvalita lano kaj multa viando kaj nun estas bredata en multaj lokoj de nia lando.

SOVAĜAJ BESTOJ KAJ FIŜOJ

Ĉinio estas riĉa je sovaĝaj bestoj, birdoj kaj fiŝoj.

Laŭ statistiko, nun la sovaĝaj bestoj nombriĝas je pli ol 400 specoj. Ili liveras viandon, felon kaj iuj eĉ raran drogaĵon kun granda ekonomia valoro. En Ĉinio vivas iuj bestoj raraj en la mondo, kiaj pando kaj orhara simio en altmontaj arbaroj de la Sudokcidento, kaj sovaĝaj ĉevaloj sur la stepoj de la Interna Mongolio kaj Hingiang.

Ankaŭ la akvoproduktaĵoj de Ĉinio estas abundaj. Maraj fiŝoj konsistigas du trionojn el pli ol 1,500 specoj de fiŝoj. Nia lando posedas vastajn marajn fiŝejojn. Kaj dolĉakvaj fiŝoj sin trovas en granda kvanto pro multaj riveroj kaj lagoj kaj oni ĝenerale bredas karpon, karason, bramon, herbo-karpon (*Ctenopharyngodon idellus*), blankan karpon kaj grandkapan fiŝon (*Aristichthys nobilis*).



Ŝafaroj sur la stepo de la Interna Mongolio

Trikiuroj kaptitaj de la Vejhing-a Fiŝkapta Brigado de Daĉen-insulo



Sur la Kovrilo:

Juna mjaŭ-a kadrino Jang Fukjuan

Sur la Dorskovrilo:

Aŭtuno

EL POPOLA ĈINIO 中國報

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO

P.O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

N-ro I (186) 1974

Ĉefa Enhavo

| | |
|--|----|
| Al niaj legantoj | 1 |
| Sub la prilumado de la nacia politiko de la Partio | 2 |
| Novaĵoj ĉe Tuoniang-rivero | 14 |
| Mia familio | 18 |
| La nacimalplimultoj de Guanghi | 21 |
| Virina putobora grupo sur olekampo | 27 |
| Surmara servoŝiparo | 30 |
| Neŭro-kirurgo Duan Guoŝeng | 32 |
| Intima intervidiĝo | 35 |
| Vizito al belartaj ekspozicioj en Pekino | 36 |
| Bambuaj lancoj (<i>poemo</i>) | 41 |
| Enterigo de cindro de S-ro Edgar Snow en Pekino | 42 |
| Vizito al Novzelando, la insula lando en Oceanio | 44 |
| Amikaj aktivadoj | 47 |
| Naturaj riĉaĵoj de Ĉinio | 48 |



Guangkjumen-a Infanĝardeno de Pekino

La fotoj prezentas la vivon de la infanoj de la Guangkjumen-a Infanĝardeno de Pekino.

La infanĝardeno vartas 250 geknabojn kun la aĝo de 3-6 jaroj, el kiuj 80 % estas infanoj de laboristoj kaj la ceteraj estas de laborantoj de ŝtataj oficejoj. Tie la infanoj lernas lingvon, nombradon, kantojn, dancojn, gimnastikojn kaj diversajn ludojn. La infanoj ricevas bonan edukadon kaj sane kreskas.

Matene en lundo la gepatroj de la infanoj portas ilin al la infanĝardeno kaj reportas ilin hejmen vespere en sabato. Tial la gepatroj povas trankvile fari sian laboron. Ĉiumonate oni pagas 19.4 juanojn por ĉiu infano.



Vartistino rakontas al la infanoj pri la modela soldato Lej Feng de la Ĉina Popola Libriga Armco kaj kuraĝigas ilin, ke ili lernu de la herooj kaj modelaj soldatoj.



Kiom estas?





Sur la turnoseĝoj





Danco *Herbofalçado*



Gimnasteto en ekzercado

Papertondaĵoj

La papertonda arto estas ĉina tradicia popola arto tre populara en la kamparo kaj havas longan historion.

La papertondaĵoj havas ne nur allogajn formojn, sed ankaŭ tre variajn enhavojn. Tiu arto plene montras la talenton kaj saĝon de nia laboranta popolo en arta kreado. Post la Liberiĝo, sub la direkto de la principo “Cent floroj kune floru, elŝovu novon el malnovo”, la arto de papertondo senĉese disvolviĝas.

La papertondaĵoj de Vukiang-gubernio de Hebej-provinco de nia lando havas intensan popolan guston, graciajn formojn kaj brilajn kolorojn. En la papertondaĵoj ornamismo kaj realismo estas lerte kombinitaj.



